



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)  
95-a jaro • n-ro 1154 (12) • **Decembro 2002**

## Jubilea Festo en Grezijono



**Informoj  
el Bruselo**

**Diverseco:  
defio, ne minaco**

**Trezoroj  
en la reto**

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio  
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto  
p/a Stano Marček, Zvolenská 15  
SK-036 01 Martin, Slovakio  
Telefono kaj telefakso:  
+421 43 4222 788  
Retpoŝto: revuo@uea.org

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 32;  
USD 30; JPY 3300 ktp); informiĝu ĉe  
via landa asocio aŭ ĉe la CO.  
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,00.

Anoncarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p.  
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p.  
90. Movada rabato 50%. Anoncoj  
sur ekstera kovrilo kostas duoble.  
Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus  
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro  
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-  
konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:  
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ  
Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

TTT: http://www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Trevor Steele.



en la apuda malferma eseo de mia antaŭulo István Ertl, ke Esperanto estas invito konatiĝi kun la Alia. Ni esperu, ke en 2003 la mondo pli atente aŭskultos niajn invitojn... Dume mi invitas vin al la lasta ĉi-jara "Vojaĝo en Esperanto-lando": ni vizitos junajn retemulojn en Svedio, "kontrolos", kion faras nia brusela korespondanto, celebros kun francaj esperantistoj la 50-jariĝon de Grejzono, intervjuos ĉinan interlingviston, serĉos verdajn trezorojn en retaj brokantejoj, simpozios kun germanaj kaj ekzameniĝos pri Esperanto kun hungaraj universitataj studentoj, por poste serĉi malnovajn dokumentojn pri aeronautiko en madrida universitato aŭ solvi plian krucenigmon... Mi deziras al vi agrablajn jarfinajn festojn kaj sukcesan jaron 2003!

## Enhavo

- 243 .... MALFERME: Diverseco: defio, ne minaco (István Ertl).  
244 .... Esperanto@Interreto (Slavik Ivanov; E@I-teamo).  
246 .... Stato de la UK-aligoj. Eŭropo bezonas komunan lingvon (Dafydd ap Fergus).  
247 .... Informoj el Bruselo (intervjuo kun Dafydd ap Fergus).  
248 .... Jubilea festo en Grejzono.  
250 .... Pri interlingvistiko kun prof. Liu Haitao (intervjuis Detlev Blanke).  
251 .... Trezoroj en la reto (Ulrich Lins).  
252 .... RECENZOJ: Marc van Oostendorp pri *Eseoj memore al Ivo Lapenna*. Fabien van Mook pri *Konstruu vian domon*.  
253 .... Karina MacGill pri *Cent ĉinaj fabloj*. Efthimios Mavrogeorgiadis pri *Astronomia almanako 2/2002*. Joel Brozovsky pri *Sen. La akustika albumo de Persone*.  
254 .... TRA LA MONDO: *Eventoj* ĉesas aperi. Simpozio en universitato (Reinhard Fössmeier). *El Popola Ĉinio*. Bankrotis Monda Turismo.  
255 .... Ekzamenoj en Hungario (Oskar Princz). Viva intervjuo (Doron Modan). Malkovroj pri Emilio Herrera (Tonyo del Barrio).  
256 .... FORPASOJ. Ralph Harry (Trevor Steele).  
257 .... LASTE APERIS.  
258 .... LOKE, FAKE.  
259 .... OFICIALA INFORMILO. ANONCETOJ.  
260 .... Krucenigma Konkurso (Stano Marček).  
261 .... INDEKSO 2002.

FRONTPAĜE: Ĉi-somere esperantistoj en la franca provinco Anĵuo celebris la 50-jariĝon de nia plej konata E-domo, instalita en kastelo, Esperantista Kulturdomo Grejzono (legu pli sur la p. 248).  
Foto: Laurent Vignaud.

## Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (strategia forumo, Unesko):** d-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎+39-06-957-57-13; f+39-06-957-66-33; renato@esperanto.org.

**Vicprezidanto (strategio kaj planado, esploro kaj dokumentado, UN Novjorko):** prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford, CT 06107 Usono; ☎+1-860-561-26-69 [h]; f+1-860-561-52-19 [h]; ☎+1-860-768-44-48 [of]; f+1-860-768-44-11 [of]; tonkin@mail.hartford.edu.

**Vicprezidanto (eksteraj rilatoj):** prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎+82-53-765-0880 [h]; +82-53-652-4488 [of]; f+82-53-652-8141 [of]; +82-53-765-0881 [h]; lee@esperanto.net.

**Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun TEJO, rilatoj kun la Komitato, kongresoj, Nobel-kampanjo):** s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-21000 Split, Kroatio; ☎+385-(0)21-535-650 [h];

+385-(0)21-355-550 [of]; f+385-(0)21-393-597 [of]; osibov@pravst.hr.

**Financo, administrado:** s-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎f+31-(0)20-642-18-53; ans.bakker@esperanto.org.

**Eduko, kulturo, ILEI-rilatoj, sporto, afrika agado:** s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎+228-227-21-17; esp.togo@cafe.tg.

**Informado:** s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-14, RU-429120 Ŝumerĵa, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio; ☎+783536/59856; andreo@mail.ru.com.

**Landa agado:** s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-06-39-72-61-98; f+39-06-39-72-61-69; michela.lipari@esperanto.org.

**Observanto de TEJO:** s-ro Marko Naoki Lins.

**Observanto de ILEI:** s-ro Mauro La Torre.

## Diverseco: defio, ne minaco

István Ertl

Esperanto estas, denaske kaj laŭdifine, invito konatiĝi kun la Alia. Diference al etnaj lingvoj, kiuj estas iloj – kvankam plej ofte, tamen nur – akcesore uzataj por tiu celo, nia idiomato estas elplanita por ĝuste tiu funkcio.

Demandeblas kigrade la Iniciatoro mem konsciis pri tio: ĉu, volvinta en la miton de l' modernio, li havis antaŭ la okuloj precipe iun (senduban, sed des pli deziran) homaran samecon kiun la lingvo esprimu, aŭ ĉu li dekomence konceptis sian instrumenton kiel helpilon malkaŝi aliecojn...? Fakte, malgravas la intenco kaj esenca la reala senco: se Esperanto eble pretervole fariĝis rivelilo de malsamo, tiam ĝi estas plia en tiu vico de homaraj progresajoj kiuj evoluis el alielaj inventoj – fenomeno cetere ilustrita de Umberto Eco en sia *La serĉado de la perfekta lingvo*.

Ankaŭ el la vidpunkto de la fina rezulto, estas malesenca la ĉefmotivo de individuo decidinta lerni la Internacian Lingvon: ĉu emo al lingva kuriozaĵo, ĉu pure mensa altiriĝo al brila produkto de pura racio, ĉu konsideroj elstare praktikaj kiel vojaĝ-faciligilo: la fina efiko estas, kvazaŭ neeviteble, konfrontiĝo kun tiu Alia kiu samtempe malkaŝas kaj maskas sian identecon uzante la lingvon saman.

Malkaŝas kaj maskas? Kio el la du plie okazas? Komparo helpu nin malkovri.

Lernante etnan lingvon, oni ideale atingas iun gradon preter kiu nepras ekkonadi kaj – eventuale nur portempe, porokaze – eĉ alproprigi kion eble plej multajn identerojn de la tiulingvanaj. (Ni lasu nun ekster konsidero – ni revenos al tio – ke identecon nur parte konstruas lingvo.) Parolante lingvon etnan, oni klopodu scii kiel ties parolantaro konceptas tempon kaj spacon; kielas ties socia strukturo; kiaj klimato, okuparo, religio, manĝkutimoj, kaj longe tiel plu, stampis la manieron laŭ kiu la lingvano sin esprimas. Sen tia kono, oni restas sur la – laŭdinda, kaj ofte ja sufiĉa – nivelo de turismaj frazlibroj. Kun tia kono, oni ne fariĝas sed *maskas* sin tiulingvano: des pli sukcese ju pli da konoj akumuliĝas.

Komunikante per etna lingvo, do, ne eblas eviti la neceson iom koni la historian heredaĵon kiu en signifa parto difinas la konscion de tiu denaska ("normala?") parolantaro kaj kunmodas ties esprimilon.

Ĉu tio ĵus dirita validas ankaŭ kaze de lingvouzo transkultura, misnomata "internacia" (ja interpersonaj), kiam A- kaj B-lingvanoj komunikas per lingvo C? Grandparte, jes: la validado malpli dependas de la komunik-situacio ol de la komunik-kvalito, proporcia al la intelekta investo en



lingvolernadon. Ekzemple, senmaraj hungaroj kaj mongoloj bone lernintaj la anglan eble uzos esprimojn kondiĉitajn de la riĉa naviga pasinteco de la Brita Imperio: *get one's bearings, go by the board, safe haven*...

Alparolante iun alian ne per sia, sed per ties aŭ alies lingvo, oni normale ne celas prezentadon ("malkaŝadon") de sia identeco, jam pro tio ke aliaj lingvoj ol la sia povus esti laŭdifine nur sekundaraj por tiu funkcio. Kio pli fremdig-efika ol klopodo alilingve klarigi la vortumajn kutimojn de nia grumblema avo, aŭ, eĉ, la recepton de nia ŝatata plado? Hungar-origina verkistino franca titolis franclingvan romanon pri sia naskiĝ-landa post-adolesko *V. O.*, versio originala, fingromontrante la paradokson ke en la romano, laŭ ŝia diro, "la franca lingvo ludas la rolon de la hungara", kvazaŭ ŝi estus "dublanta sian vivon franclingven".

Sed, ĉefe, la komunik-situacio mem kutime ne favoras identeco-montron, ĉar en alilingva komunikado ni instinkte serĉas ne diferencigojn, sed komunan denominatoron, kundivideblan spertobazon sur kiu konstrueblas la pluo de la kunparolo. (Kaj dume ni, kun singena rideto, forŝovas mens-angulen aludojn proprakulturajn, citaĵojn nialingve komune konatajn, eĉ iujn mangestojn kaj mienojn, ĉiuj el kiuj tiom taŭge apogus nian argumenton – se nur tiu Alia komprenus.)

Ni venu al la komparo supre anoncita: kiel ĉi tiuj faktoroj funkcias, aŭ funkcii, kaze de komunikado Esperanta?

La grumbloj de nia avo, la recepto de nia plado ankaŭ en Esperanta traduko sonos fremdecaj – sed nur al ni mem. Por aliaj E-lingvanoj temos simple pri pluaj eroj de ilia Esperanta spertaro, kiuj ĝin samrange konstituas kiel la kontribuoj de ajna alia membro de la lingvokomunumo. Kaj ni mem alios alies personajn alportojn kun sama sinteno, ĉar – almenaŭ principe – nenies spertoj havas ian privilegie plian hejmecon en la Esperanta realo transreala.

Ni ĉiuj tradukas nin en Esperanton, ni ĉiuj peras, filtras nian propraron en la komunan transkulturan. Nia reciproka fremdeco konstruas nian malfremdecon.

Vi diros: jes, sed la denaskuloj? jes, sed raŭnismo? jes, sed la fakto ke ĉi tiuj ideoj mem estas Esperante formulataj kaj pensataj, ne perataj? Ĉu pro ĉio ĉi, kaj alikiale, ne estas tamen tiel ke Esperanto ja trudas al ni iagradan samecon, surmetas

al ni maskon de Esperanta komuneco, rezignigas al ni gravajn erojn de niaj identecoj? Kaj ke, kaze de esence pli larĝa disvastiĝo de nia lingvo, des pli okazos tiel?

La lastan demandon prognozan, kvankam ĝi traktinde trapensendas, ni nun lasu ekster konsidero. Rilate la Esperantan nunon, sendubas ke 115 jaroj estas skalfaldintaj imponan konstruaĵon propran, kies etaĝojn nov-venanto al nia lingvo povas konkeri unu post alia. Povas; ne devas.

Same kiel la dek ses reguloj estas – kiel vortumis Auld – “dekse permesaĵoj”, tiel ankaŭ nia kulturo ne estas, kaj ne estu, ekskludejo sed akceptejo. Estas pli ol krimo, ja eraro, krei superstrukturojn emfaze sur la – ĉiam nur krome kaj aldone ekzistanta – Esperanta identeco. Imiti ŝtaton egalas al forĵeto de nia ekzist-rajtiga preterŝtateco; meti sur piedestalon nian Esperantan apartecon estas redukti nian universalan potencialon al konkreto partikulara.

Ŝlosilaj vortoj, male, estas “gasto” kaj “gastigo”, ripetite ideataj de Daŝgupto. La defino de la homara diverseco la esperantistaro respondu ne per rigidigo de ia propra maldiversa identec-fortiga, sed persistante pri sia supra, konstante rol-ŝanĝa sistemo de intergastado kaj -gastigado, kiu estas al ĝi “denaske” propra. Kompreneble, ĉiu el ni liberigas difini principarojn, regularojn por lim-marki propran teron en la tutmonda Esperanta spaco kaj inviti tiuspacen respektantojn de tiuj principaroj kaj regularoj. Ankaŭ tio estas gastigado – sed gastigado kiu memorigas pli la traktadon de eksterŝtatan fare de ŝtata burokratio ol hejmeĉan ĉesidon ĉirkaŭ komune homara fajro. Al nia tradicio pli konvenas la konduto de gastiganto kiu bonvenigas gaston sen starigi kondiĉojn, kaj de gasto kiu recipokas la bonvenigon per siaj propraj pozitivaj.

Necesa kaj sufiĉa kondiĉo por tiu intergastado estas, evidente, la kunhavo de komunik-kodo, la scipovo de komuniga Esperanto. Postuli ion preter tiu komuniga egalas al la ĵus dirita lim-markado.

Sed ĉu ni tute rezignu, iu povus demandi, pri la nelingvaj eroj de Esperanta identeco? Kaj entute, kiuj estas tiuj eroj?

Reciproka toleremo, scivolo pri la alieco de la alia, preteco rekonsideri siajn starpunktojn sub influo de la alia – ni povus respondi, sed ĉi tiuj ecoj ja ŝajnas korolariaj al la finde universala principo de gastigado.

Ĉi tio ne ekskludas (estus freneze eĉ pensi pri ekskludo) la iompostioman, kaj evidente dekomence okazantan,

konstruadon de komune Esperanta valoraro – sed tiuj valoroj ne rajtas funkcii kiel difiniloj de unuopula aparteno al nia komunumo. Ni aŭdacu diri ke valoroj povas esti postulatoj nur por la esperantistaro kiel tuto, sed ne por individuo: ĉar Esperanto povas plenumi sian klerige progresigan taskon ĝuste se ĝi peras – ne trudas – valorojn, anstataŭ prediki al konvertitoj.

Mi kredas ke la forto de nia tradicio kaj de nia komunumo ebligas al ni plenumadi tiun taskon, evitante apartiĝemajn enfermiĝojn. Diverseco estas ne minaco; ĝi estas defio.

\*\*\*\*\*

Eseo gajninta trian premion en la Belartaj Konkursoj de UEA 2002

# Esperanto@Interreto

**Esperanto@Interreto (mallonge E@I) estas agado de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ĝi realigas projektojn, kiuj helpas al Esperanto-parolantoj uzi interreton por tutmonde kunlabori, informi pri Esperanto kaj instrui ĝin.**

La tri ĉefaj agadkampoj de E@I estas krei retajn paĝarojn, aranĝi seminariojn kaj informi pri kiel Esperanto kaj interreto kune uzblas por facile kaj rapide komuniki tutmonde. En tiu ĉi artikolo vi povas legi raporton de la lasta E@I-seminario, vidi iujn konkretajn rezultojn kaj informiĝi pri la nunaj E@I-projektoj kaj planoj pri novaj seminarioj.



„koran“ kaj „mengan“, la „kora“ okupiĝis pri aspektigo kaj la „mensa“ pri la enhavo de produktataj informiloj; teknika (laboris pri la Reta Informado-Centro, RIC); kaj filma (produktis mallongajn filmojn por interreto pri Esperanto-vivo).

Dum la seminario prelegis kelkaj spertuloj pri informado: Lu Wunsch-Rolshoven (Germanio), Ziko M. Sikosek (Germanio) kaj Giuseppe Castelli (Italio). Ili sukcesis bone klasifiki oftajn erarojn, kiujn faras esperantistoj informante pri sia lingvo la eksteran publikon.

E@I-4, estante TEJO-seminario, ne povis esti tute “seka”. Okazis interesaj vesperaj programeroj kaj kreiĝis novaj kulturajĵoj por nia internacia junulara komunumo. Vi ekscios pri ili iom poste, nur memoru la ŝlosilvortojn: „sandviĉo“, „kio okazas?“ kaj „naprelo“.

**Slavik Ivanov,**  
komitatano de REJM  
(Rusia Esperantista Junulara Movado)

## La lasta E@I-Seminario

En la lasta oktobra semajno en Lesjöfors, Svedio, okazis seminario „Esperanto ĉe Interreto 4“. Al la seminario kunvenis 28 junuloj el 14 landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko. Kiel temo de la seminario estis elektita „Rete Informadi“.

La partoprenantoj loĝis en la Esperanto-domo „Esperanto-gården“, kiu, interalie, estos la ĉefa ejo de JK-2003. Plejparto de la laboro okazis en la apuda mezlernejo. La Esperanto-domo, la urbeto kaj la ĉirkaŭaĵo estas tre belaj – konsideru tion dum planado de viaj someraj ferioj. Aparte menciindas la biblioteko de la Esperanto-domo, arbarkovritaj montetoj kaj loka muzeo.

Dum la seminario funkciis kvar laborgrupoj: strategia (prilaboris strategiajn demandojn de ekstera informado); informila (zorgis pri produktado de informiloj); enhavis du subgrupojn,

## Rezultoj de la seminario

Unu el la celoj de la seminario estis produkti konkretan informmaterialon. Ni sukcesis pri diversaj afiŝoj, informiloj, T-ĉemizoj kaj filmetoj. La informiloj estos unue en la rusa, franca, germana kaj la angla, kaj ilia celo estos



informado al neesperantistoj pri TEJO. Afiŝo por Pasporta Servo estos presita unue en la angla, poste espereble ankaŭ en aliaj lingvoj. Sur la mano kiu videblas sur la afiŝo estas tatuoj kun la vorto “Esperanto”, kaj malsupre maldekstre teksto “Prenu vian vojon al la mondo. Ĉio kion vi bezonas estas via dikfingro...” (“Hitch your ride to the world. All you need is your thumb...”), kun ttt-adreso de la retpaĝoj de Pasporta Servo.

Alia celo de la seminario estis komenci la realigadon de Reta Informado-Centro (mallonge RIC). La celo de RIC estas subteni informantojn pri Esperanto, TEJO, UEA, E@I ktp. Ni sukcesis krei teknikan kadron por la paĝaro sed ĝi ankoraŭ ne estas plenigita per informmaterialo. Se vi havas bonan informilon kaj vi pretas dividi ĝin kun aliaj informantoj, nepre alŝutu ĝin interrete al RIC per ĝia “Alŝutformularo”!

La menciitaj materialoj kaj ligilo al la filmeto “Kio okazas?”, ankaŭ farita dum la seminario, troviĝas ĉe:

<http://www.iks.net/cgi-bin/wiki.pl>, Konkretaj Rezultoj (atentu pri majuskloj/minuskloj)

## La nunaj projektoj

Jen listo de aktualaj projektoj kadre de la E@I-agado:

**lemnu!** - [www.lemnu.net](http://www.lemnu.net): Multlingva kursejo de Esperanto. Krom kursoj en diversaj niveloj, ĝi enhavas vortarojn, superrigardon de la gramatiko, laŭtlegitajn rakontojn kun bildoj, prezentojn de Esperanto, tujmesaĝilon ktp. Se vi volas helpi pri tradukado, bv. skribi al [traduko@lemnu.net](mailto:traduko@lemnu.net).

**Edukado.net** - [www.edukado.net](http://www.edukado.net): Paĝaro kun la celo helpi al Esperanto-instruistoj, enhavas kolekton da lerniloj, librokatalogon kun opinioj de homoj kiuj uzis la librojn, liston de aktualaj kursoj ktp. Pri la enhavo de Edukado.net respondecas Katalin Kovats; vi bonvenas sendi viajn kontribuojn al [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).



### Stato de la UK-aligoj

Ĝis la fino de novembro 2002 aliĝis al la 88-a UK en Gotenburgo (de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2003) ĉ. 300 personoj el 45 landoj.

Post Svedio (50), plej multaj kongresanoj estas el Nederlando (30), Germanio ( 24), Francio (20), Japanio (18), Britio (13), Belgio (12), Italio kaj Usono (10). Plej multajn aliĝojn oni atendas en decembro, pro la fino de la plej favora kotizperiodo. Ekde januaro 2003 la kotizoj plialtiĝos je 25%. Do, bv. rapidi aliĝi kaj pagi ĝis la jarfino.

**Fondaĵo Canuto** Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

## Eŭropa bezonas komunan lingvon

Fine de oktobro Timothy Garton Ash, fama historiisto kaj prestiĝa publicisto, Oxforda profesoro, skribis en la brita gazeto *The Guardian* pri la lingva problemoj.

Post kelkaj tagoj la tradukoj de la artikolo de Ash aperis en itala, flandra kaj kataluna gazetoj. Ash iom ŝerce konsideris la komunikadan problemon, konkludante ke: *La latina ne taŭgas ... Esperanto estas ridinda. La sola serioza kandidato estas la angla, la nova komuna lingvo.*

Ekstis, kompreneble, vigla diskuto inter esperantistoj kadre de la dissendolisto ĉe <http://groups.yahoo.com/group/reago>. Unuj opinias ke Ash konsideras ke necesas iom argumenti la netaŭgecon de la latina. Sed la ridindeco de Esperanto ŝajne estas tiel 'memevidenta' kaj 'klara' al la legantoj ke ĝi ne meritas pluan komenton laŭ Ash.

Ian Fantom el Britio klarigas la sintenon de Ash jene: "Laŭ mi li ne priskribas sian opinionon, sed raportas, ne tute serioze, pri la diskuto. Do eble iom humura respondo estas bezonata: eble ke kompreneble ĝi ne taŭgas, ĉar tiu estas la sola kiu efektive solvus la problemon. La reĝo ne surhavas vestojn! Sed anstataŭ diskuti inter ni, eble povus esti pli bone direkti niajn komentojn al [letters@guardian.co.uk](mailto:letters@guardian.co.uk). Dafydd ap Fergus

*Edukado, La Lingva Prismo kaj lemulo!* estas subtenataj de *Esperantic Studies Foundation* kaj ni tre dankas pri tiu subteno. Ĝi ebligas al ni dediĉi multe pli da tempo al la projektoj ol ni povus sen ĝi.

### Estontaj seminarioj

Unu el la kernaj kampoj de E@I-ago estas seminarioj, en kiuj E-aktivuloj trejniĝas kaj spertiĝas pri diversaj manieroj uzi Esperanton kaj interreton. Aperas novaj aktivuloj kaj novaj Esperanto-parolantoj. Dum la seminarioj renkontiĝas kaj ofte freŝiĝas per novaj membroj teamoj de aktualaj E@I-projektoj, naskiĝas ideoj por novaj projektoj kaj aktivigigas novaj homoj.

**Ĝis nun okazis kvar E@I-seminarioj:**  
Esperanto@Interreto-1 – Svedio, printempo 2000  
Esperanto@Interreto-2 „Rete Kunlabori“ – Svedio, aŭtuno 2001  
Esperanto@Interreto-3 „Rete Lingvumi“ – Jugoslavio, printempo 2002  
Esperanto@Interreto-4 „Rete Informadi“ – Svedio, aŭtuno 2002

**Kaj estas planataj, sed ankoraŭ ne certaj** (ĉar ni ankoraŭ ne trovis sufiĉajn subvenciojn):  
Esperanto@Interreto-5 „Rete Lerni“ – Usono, ĉe universitato MIT, printempo 2003  
Esperanto@Interreto-6 „Rete Komunik“ – Turkio, aŭtuno 2003  
Esperanto@Interreto-7 – Kroatio, printempo 2004  
E@I-oj en Rusio, Litovio, Sud-Ameriko, kaj laŭeble aliaj kontinentoj.

La E@I-teamo ([ecxei@tejo.org](mailto:ecxei@tejo.org))

### Fondaĵo Esperanto@Interreto

Por subteni ĉiujn ĉi-projekton, kaj ebligi pludaŭron de E@I-ago, kreiĝis Fondaĵo Esperanto@Interreto. La rimedoj finance subtenas:

- \* E@I-seminariojn, kiam rimedoj de aliaj fondaĵoj/subtenantoj ne sufiĉas
  - \* unuopulojn kiuj bezonas helpon por povi partopreni en eventoj utilaj por la E@I-ago
  - \* ĝeneralan administradon de la E@I-ago (retpaĝoj, kopiado, sendo-kostoj ktp)
- Se vi volas kontribui al la fondaĵo, ni tre ĝojus kaj dankus! Ĝi uzas la UEA-konton ecxi-v.



# Informoj el Bruselo



Komence de la jaro Universala Esperanto-Asocio kaj Eŭropa Esperanto-Unio interkonsentis pri la starigo de Komunikadcentro en Bruselo. Ni intervjuis la estron de la Centro kaj nian bruselan korespondanton Dafydd ap Fergus por ekscii pli.

**\* Kie estas la Komunikadcentro? Ĉu ĝi estas en taŭga kaj centra loko?**

Ankoraŭ ni ne havas oficejon, ĉefe pro tio ke mi ĝis nun estas la sola dungito de Eŭropa Esperanto-Unio. Mi mem laboras hejme aŭ en la Eŭropa Parlamento. Tamen la laboro rapide evoluas kaj baldaŭ nepros fizika oficejo. Kune kun UEA ni diskutas la eblajn.

**\* Kion vi faras?**

La agado celas plibonigi la publikan bildon pri Esperanto. Tamen komprenu ke UEA ne havas la financajn rimedojn de Coca Cola, Pepsi aŭ Sony. Ne eblas sendi belajn broŝurojn al miloj da politikistoj kaj ĵurnalistoj, sciante ke la broŝuroj atingos rubaĵojn! Pro tio la agado baziĝas sur kunlaboro de multaj volontuloj. Estas tri ĉefaj taskoj.

Unue, la analizo kaj kreado de lingvaj dosieroj. Ni tranĉas la lingvan problemon en "manĝeblajn pecojn" por politikistoj kaj ĵurnalistoj. Do, ni evitas pretajn solvojn por lingvaj problemoj. Tion ni lasas al politikistoj kaj profesoroj, kiuj ja havas la monon por fari tion. Pro tio, ekzemple, UEA faras oficialan plendon kontraŭ la lingva diskriminacio ĉe eŭropaj organizoj. Ankaŭ la Flandra Esperanto-Ligo faras oficialan petskribon al la Flandra Parlamento por ke ĝi okupiĝu pri la lingva problemoj kaj konsideru metodojn, inkluzive la uzadon de Esperanto, por eviti tiun problemon. Tiuj lingvaj dosieroj estas vizitkartoj kiuj permesas al ni paroli kun ĵurnalistoj, politikistoj kaj aliaj organizoj. Plejofte estas poste okazo informi pri Esperanto en pli neŭtrala sfero.

Due, sur bazo de la lingvaj dosieroj – kiujn ni vere kreas – mi kontaktas ĵurnalistojn aŭ mem skribas artikolojn kune kun volontuloj. Dank' al la bonega laboro de Aaron Irvine, kiu prizorgas nian retejon [www.lingvo.org](http://www.lingvo.org), ni regule informas politikistojn kaj ĵurnalistojn ilialingve. Foje artikolon aŭ gazetaran komunikon de [lingvo.org](http://lingvo.org) ricevas 5000 homoj. Do, ĉio devas esti perfekta kaj profesia. Tiu inform-ago instigas ĵurnalistojn skribi artikolojn kaj politikistojn fari oficialajn demandojn al ministroj pri konkretaj lingvaj problemoj aŭ pri la uzado de Esperanto. Rigardu ĉe la "artikolo-biblioteko" je [www.lingvo.org/eo/\\*gaz](http://www.lingvo.org/eo/*gaz) por legi artikolojn pri Esperanto kaj pri nia agado. Preskaŭ ĉiutage estas nova artikolo en la listo.

Tria parto de la agado estas sekvi la publikan bildon de Esperanto. Ni sekvas la uzadon de la vorto *Esperanto* en gazetoj kaj revuoj tra la mondo. Ofte ĵurnalistoj uzas la vorton por indiki ion artefaritan, senesperan aŭ frenezan. La Komunikadcentro aŝiŝas tiujn menciojn pri Esperanto,

ebligante al pli ol 140 volontuloj reagi rekte al la ĵurnalistoj. Plejofte oni publikigas la reagojn kaj la ĵurnalistoj tiele konscias ke Esperanto ekzistas.

**\* Tre bone, sed kiujn konkretajn rezultojn vi havas?**

En oktobro, ekzemple, estis ĉirkaŭ dek artikoloj publikigitaj pri la lingva problemoj. Ĉiumonate estas novaj parlamentaj demandoj, foje je nacia nivelo, foje en la Eŭropa Parlamento. Tio signifas ke EEU kaj UEA fariĝas ligataj al la diskuto pri la lingva problemoj. Pro tio la Eŭropa Komisiono invitas la prezidanton de UEA, Renato Corsetti, al konferenco pri la

lingva diverseco. Antaŭ semajno brusela gazeto telefonis al mi por skribi kritikan artikolon pri la uzado de la angla kiel pontolingvo por interpretado en la Eŭropa Parlamento. Do, eĉ se politikistoj aŭ oficioj ne volas kaj neniam volos Esperanton kiel komunuman lingvon, ili tamen devas pritrakti niajn opinionojn kaj informojn.

**\* Ĉu vi konvinkas homojn pri Esperanto?**

Kompreneble. Ekzemple kelkaj membroj de la franca lingva asocio *Défense de la Langue française* nun lernas Esperanton. Ili ĉefe estas allogataj per la agado de esperantistoj por la lingva egaleco kaj diverseco. Estas kelkaj eŭropaj tradukistoj kiuj nun eklernas Esperanton. Mi mem baldaŭ komencos instrui komencantojn en Bruselo, en konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono.

Oni memoru ke Esperantujo ne estas sekto. Pli facile kaj pli havi la senton ke ili decidus ekleri aŭ apogi Esperanton. Oni devas vendi Esperanton laŭ la klientoj. Por ĵurnaloj estas tre allogaj muziko, Pasporta Servo, Interreto kaj junularaj seminarioj. Por politikistoj estas pli interesaj konkretaj lingvaj problemoj.

**\* Ĉu via agado estas direktita kontraŭ la angla lingvo?**

Tute ne. Grava parto de la agado estas montri la avantaĝojn, kiujn havas neŭtrala lingvo kiel Esperanto, ankaŭ por denaskaj parolantoj de la angla. Hodiaŭ, se denaskaj parolantoj de la angla provas paroli la araban, nederlandan aŭ alian lingvon, ili ofte nur ricevas respondon en la angla ĉar ĉi oni volas praktiki la anglan. Do, anglalingvanoj ne havas la samajn ŝancojn lerni aliajn lingvojn!



# Jubilea festo en Grezijono



**Ĉi-somere, la 20-an de julio, esperantistoj en la franca provinco Anĵuo celebris la 50-jariĝon de nia plej konata E-domo, instalita en kastelo, Esperantista Kulturdomo Grezijono.**

**K**elkajn jarojn antaŭ la lasta mondmilito, la franca asocio GEE (Grupo de Esperantistaj Edukistoj) organizis somerlernejojn por instruoj la lingvon al homoj plenaj je idealoj. Tiuj somerlernejoj rekomenciĝis post la milito, ĉiujare en nova loko. Tamen, estis pli kaj pli malfacile trovi taŭgan ejon (hotelo, gimnazio...) kaj ekestis la ideo aĉeti propran bienon por organizi tiujn kursojn.

Henri Micard, instruisto, kiu loĝis en okcidenta Francio, komencis serĉi en sia regiono. En 1951 li iniciatis fondiĝon de la asocio "Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj" kun la celo arigi sufiĉan monon por aĉeti de taŭga bieno. Temis pri kooperativa societo, kies tiamaj membroj investis multon el siaj ŝparaĵoj por atingi la celon.

En oktobro 1951 Henri Micard aŭdis pri "Grésillon", kastelo situanta apud la urbeto Baugé. Post financaj malfacilaĵoj, en januaro 1952 la asocio povis finpagi la kastelon. En ĝi estis neniu komforto, nek meblaro. Dum la printempo 1952 volontuloj instalas elektron kaj akvon. Por la someraj aranĝoj estis pruntedonitaj litoj de la Baugé-a gimnazio. La oficiala inaŭguro okazis la 31-an de aŭgusto 1952.

S-ino Micard preparis la manĝojn kaj eta skipo sin dediĉis al la funkciado de la domo. Dum la unuaj jaroj, staĝanoj devis labori ne nur en la kursejoj, sed ankaŭ en la kuirejo. Iom-post-iom, dank' al donacoj kaj aĉetoj, la meblaro instaligis en la kastelo. Litkovriloj estis fabrikitaj el kvadratoj trikitaj de bonvolemlinoj. En 1954, kuraĝuloj konstruis banejon, kiu arigis grandan homamason dum

la posttagmezoj. En 1963, kvar unuaj duŝiloj estis instalitaj. Grésillon funkciis ne nur somere, sed ankaŭ dum Paskaj ferioj kaj okaze de vintraj jarfinaj festoj. Post grandega laboro por Grésillon, ges-roj Micard devis rezigni pro sanproblemoj kaj tiam ges-roj Babin prenis la taskon daŭrigi la aferon. Post pluraj jardekoj da sindediĉo, ankaŭ ili transdonis la torĉon al nova teamo.

Multo ŝanĝiĝis en la Kulturdomo, pro evoluo de la socio. Staĝanoj deziris pli da komforto: iom-post-iom dormoĉambroj disponis pri vama akvo kaj ricevis novajn litojn, kovrilojn, murtapetojn... Estis konstruitaj novaj duŝejoj. Dungitoj zorgis pri preparo de la manĝoj kaj purigado de la domo.

La unua celo de la asocio "Kulturdomo" estis provizi ejon por aranĝoj de diversaj Esperanto-asocioj. Tamen, maloftaj estis tiaj petoj kaj la Kulturdomo devis organizi sian propran programon. La diversnivelaĵoj daŭris tri semajnojn. La deziroj de la publiko intertempe ŝanĝiĝis: nun estas pli da proponoj por E-aranĝoj, familioj preferas ferii en diversaj lokoj... Tial la daŭro de la studperiodoj reduktiĝis al du semajnoj, kaj fine nur unu.

Antaŭ tri jaroj granda bato frapis la kulturdomon. Sekureca komisiono malpermesis la uzadon de la dormoĉambroj kaj de la kuirejo. Dank' al malavara helpo de esperantistoj kaj streĉa laboro de kuraĝaj kaj kompetentaj bonvolemluloj, eblis obei minimumajn postulojn por sekvan jaron uzi parton de la kastelo. Nun, progresive okazas novaj normigoj kaj plibonigoj por ebligi pli kompletan uzon de la domo.

## La 50-a datreveno

**L**a 20-an de julio 2002 la komitato de la Kastelo Grezijono organizis grandan feston por celebri la 50-an datrevenon de la Kulturdomo, dum sunbrila vetero.

Post paroladoj de Christian Rivière (komitatano), Bérengère Cheverry (aktivilino en la vivo de Grezijono), Marie-Thérèse Lloancy prezentis la ĵus eldonitan memorlibron, en kiu ŝi kompilis artikolojn kaj memor-atestaĵojn pri la kastela vivo ekde ĝia kreo. La memorlibron la kontribuintoj surloke subskribis. Cent ekzempleroj jam estas venditaj kaj aliaj printotaj, kiam mono sufiĉos por eldoni pliajn.

Dum la "honora vino" multaj esperantistoj kaj francaj amikoj gustumis la lokan vinon: regionaj oficialaj gravuloj, reprezentantoj de francaj E-asocioj (ekz UFE), grupo de partoprenantoj el Bouresse-staĝo (Marjorie Boulton), radio *Esperanto*, diversaĝaj gastoj.

Estis projekciitaj filmoj pri Grezijono, okazis ekspozicio pri Esperanto (en la franca lingvo), enketo por la infanoj pri Grezijono kaj la E-movado, prezentado de malnovaj metiistoj (fer-prilaboristo, korbfaristo, juvelkrestoj, lignaĵisto, skulptisto, pentristo, ĝuartisto, radio-amatoroj, pajlosegopararisto), ellaso de verdaj balonoj (*sur la supra bildo*), lokaj manĝaĵoj (krespoj, lokaj specialaĵoj el garnita pano), ludo "kiom pezas la korbo?", muzikistoj, infanludaj budoj (ringoludo, skatololudo, saĝetludo, ĵetdisketa ludo, fiŝkaptado). Vespere la staĝanoj kaj la organizantoj kunmanĝis kaj dancis ĝis malfrua nokto en la nova diskoteke. La organiza teamo preparas jubilean libron pri la memoraĵ-festo de la somero 2002 en la kastelo.

Dum la somero 2002 okazis diversgradaj Esperanto-staĝoj kaj programoj: staĝo pri astronomio, kreado de ludoj en Esperanto, seminario pri interkulturo, koruso kaj voĉa laboro, prelegoj (literaturo kaj teologio, historio de Grezijono kaj aktuala vivo, fromaĝfarado...), sportludoj en granda parko, infan-renkontiĝo, "Festo" (organizita de JEFO) kaj aliaj.

Dum la somero 2002 okazis diversgradaj Esperanto-staĝoj kaj programoj: staĝo pri astronomio, kreado de ludoj en Esperanto, seminario pri interkulturo, koruso kaj voĉa laboro, prelegoj (literaturo kaj teologio, historio de Grezijono kaj aktuala vivo, fromaĝfarado...), sportludoj en granda parko, infan-renkontiĝo, "Festo" (organizita de JEFO) kaj aliaj.

**Sur la fotoj de Laurent Vignaud: Gejunuloj el JEFO, LS de TEJO, organizis de la 31-a de aŭgusto ĝis la 7-a de septembro en Grezijono propran Feston, kiun partoprenis trideko da gejunuloj el Usono, Nederlando, Germanio, Rusio, Hispanio kaj Francio.**



## Grezijono hodiaŭ

**L**as nenprofitela asocio "Kulturdomo de Esperanto", fondita en 1951, ĝis nun posedas la kastelon Grezijono kun 18-hektara parko. Ĝi organizas aŭ gastigas diversgradajn kursojn, prelegojn, distraĵojn kaj ekskursojn en la belega regiono Anĵuo. Ĝi disponigas al la staĝanoj kursoĉambrojn, salonojn, riĉan bibliotekon kaj libroservon, butikon (agrabla kunvenejo, kie oni povas trinki kaj aĉeti memoraĵojn) kaj sportejoj (tablo-teniso, flugpilko, migradpadoj...).

Estas ebleco de senpagaj staĝoj: oni povas helpi dum la labor-semajnfinoj (5 ĝis 8 jare). La tranoktado kaj manĝoj estas ofertataj kontraŭ manlaborado (farbado, murtapetado, elektraĵoj, riparoj, eksteraj laboroj pri arboj, heĝoj, ktp). Tiujn semajnfinojn kutime partoprenas inter 10 kaj 40 samideanoj.

En 2003 en Grezijono okazos Kongreso de Laborista E-Federacio (FET), Kongreso de Esperanto en Francio (KEFO), Someraj semajnaj staĝoj kun prelegoj, Renkontiĝo Esperanto 44, Verkado-staĝoj kun István Nemere kaj Anna Lowenstein, Renkontiĝo de E-Familioj (REFO), neformalaj renkontiĝoj, Internacia Renkontiĝo de Infanoj (inter 6 kaj 15 jaroj, ankaŭ komencantoj), renkontiĝo "Festo" (konfirmota) kaj aliaj E-aranĝoj.

Pliaj informoj riceveblas ĉe: Kastelo de Esperanto/Château de Grésillon, FR-49150 Baugé, Francio. Rete: [kastelo.gresillon@free.fr](mailto:kastelo.gresillon@free.fr), <http://grezijono.kastelo.free.fr>



# Pri interlingvistiko kun prof. Liu Haitao

La ĉina interlingvisto Liu Haitao dum pli ol jardeko en kaj ekster Ĉinio multe agas por interlingvistiko kaj la scienca traktado de Esperanto (kp. lian retpaĝaron [www.liuhaitao.net/eniro.html](http://www.liuhaitao.net/eniro.html)). Li publikigis aron da gravaj studoj kaj recenzoj kaj redaktis (kun Sabine Fiedler) ampleksan libron pri interlingvistiko. Li estas membro de la redakta komitato de la revuo *Esperantologio – Esperanto Studies*. Antaŭ nelonge la 40-jara eksperto estis nomumita universitata profesoro pri komputila lingvistiko en grava ĉina universitato, kiu ankaŭ ludis signifan rolon por Esperanto. La nova profesoro bezonas la helpon de kolegoj ([hliu@bbi.edu.cn](mailto:hliu@bbi.edu.cn)). Detlev Blanke ([dblanke.gil@sfnafu.de](mailto:dblanke.gil@sfnafu.de)) starigis al li kelkajn demandojn.

**DB:** Kiel vi venis al interlingvistiko, kaj ekde kiam vi okupiĝas pri ĝi?

LHT: Mi ekinteresiĝis pri lingvoj ĉirkaŭ la jaro 1980. En tiu tempo mi studis informadikon en la universitato. En Ĉinio estas vere malfacile ŝanĝi sian fakon laŭ sia prefero. Tial mi devis finstudi informadikon ĝis 1983. Esperanton mi memstudis en 1982, kio konatigis min kun interlingvistiko. La problemojn de interlingvistiko mi sisteme tuŝis ekde 1985. Laŭ mia kompreno interlingvistiko estas scienco pri interlingva komunikado. Oni povas studi ĝin laŭ diversaj vidpunktoj.

**DB:** Nuntempe – laŭ mia observo – vi estas la plej aktiva interlingvisto en Ĉinio. Vi publikigis aron da gravaj studoj kaj ampleksaj recenzoj en diversaj lingvoj, kunredaktis ampleksan libron. Pri kiuj temoj vi verkis kaj en kiuj lingvoj?

LHT: Dankon. Ĉar mi opinias, ke interlingvistiko ne nur estas scienco pri planlingvoj, mi volas studi la problemaron el multaj flankoj. Laŭ mia konvinko interlingvistoj devas respondi ĉiujn demandojn pri interlingva komunikado, ne nur pri interhoma, sed ankaŭ pri la komunikado inter homo kaj komputilo. Mi klopodas serĉi la radikojn de interlingvistiko en diversaj sciencoj kaj esplori la signifon de interlingvistiko por aliaj sciencoj. Mi povas legi dokumentojn en Esperanto, la angla, germana, franca, rusa kaj en aliaj planlingvoj. Bedaŭrinde mi nur pasive regas la lingvojn. Kutime, se la celitaj legantoj estas ĉinoj, mi verkas en la ĉina, por alilingvaj legantoj mi kutime uzas Esperanton. Mi ankaŭ verkas en la angla, se la redaktoro petas tion, konsiderante ke la studo estas signifa por fakuloj ekster Esperantio. Jen kelkaj temoj, kiujn mi iam tuŝis: fundamentaj demandoj de interlingvistiko kaj planlingvoj, interlingvistiko kaj komputila lingvistiko en diversaj aplikoj, planlingvoj kaj terminologio, planlingvoj kaj la strukturo de la ĉina lingvo, planlingvoj kaj kreolaj/piĝinaj lingvoj, interlingvistiko kaj interkultura komunikado, interlingvistiko kaj kibernetiko, planlingvoj kaj lingvoplanado, interlingvistiko kaj lingvaj homaj rajtoj...

**DB:** Kiun rolon interlingvistiko nun ludas en Ĉinio? Kiun rolon ĝi devus ludi?

LHT: Kiel en aliaj landoj ankaŭ en Ĉinio interlingvistiko apenaŭ ludas rolon en la scienco. Laŭ mia takso oni tamen estus preta akcepti ĝin, se ni povus liveri pli multajn signifajn sciencajn rezultojn. Nuntempe multaj sociolingvistoj interesiĝas pri lingvaj homaj rajtoj kaj lingva ekologio. Estas tamen por ili malfacile trovi taŭgan solvon. Interlingvistiko povus ludi gravan kaj efikan rolon en tiu ĉi kampo. Tio validas ne nur por Ĉinio, sed eĉ pli multe kaj pli grave por la tuta mondo.

**DB:** Ĉu la Esperanto-movado en Ĉinio subtenas viajn interlingvistikajn aktivigojn?

LHT: Ĉar mi antaŭe vivis en izolita regiono de Ĉinio, mi havis nur malmultajn kontaktojn kun Ĉina Esperanto-Ligo. Mi tamen havas la impreson, ke ĈEL ne tre interesiĝas pri la scienca flanko

**DB:** Ĉu la Esperanto-movado en Ĉinio subtenas viajn interlingvistikajn aktivigojn?

LHT: Ĉar mi antaŭe vivis en izolita regiono de Ĉinio, mi havis nur malmultajn kontaktojn kun Ĉina Esperanto-Ligo. Mi tamen havas la impreson, ke ĈEL ne tre interesiĝas pri la scienca flanko



de planlingvoj, do pri interlingvistiko. Espereble inter ĈEL kaj mi estonte plifortiĝos la komunikado.

**DB:** Pri kiuj aliaj fakoj vi okupiĝas, krom pri interlingvistiko?

LHT: Mi krome okupiĝas pri informadiko, komputila lingvistiko, lingva planado, dependa sintakso kaj kelkaj aliaj branĉoj de lingvistiko.

**DB:** Bv. informi pri via originala profesio, via ĝisnuna laboro kaj la nova kariero kiel universitata profesoro.

LHT: Mi laboris ekde 1983 en unu el la plej grandaj fabrikoj pri aluminio en la mondo. Tie mi progresis de asista teknikisto al ĉefinformadikisto. Sub mia gvido fakte la informadika reputacio de mia fabriko fariĝis la plej bona inter la samtipaj firmaoj de Ĉinio.

**DB:** Kiel okazis, ke oni nomumis vin universitata profesoro?

LHT: Kiel konate, mi studas interlingvistikon kaj lingvistikon nur kiel satokupon. La plej grandan parton de mia tempo mi devis uzi por mia profesio, do informadiko. La neprofesia studo limigis miajn interkomunikadojn kun aliaj kolegoj en la lingvistika medio. Mi mem ĉiam esperis labori kiel profesia lingvisto en universitato. Lastjare oni rekomendis min por BBI (Beijing Broadcasting Institute) kiel profesoron pri aplikata kaj komputila lingvistiko. Estas tre malfacile akiri laboreblecon en Beijing. Mi tial devis atendi ĝis ĉi aŭgusto. Nun ĉio estas en ordo.

En Ĉinio preskaŭ en ĉiuj profesioj ekzistas akademaj titoloj pri teknika klereco. La titolo de universitata profesoro estas uzata nur en universitatoj. En aliaj profesioj ekzistas titoloj, kiuj samrangas al tiu de universitata profesoro. Antaŭ du jaroj oni nomumis min 'elstara supera inĝeniero'. Tial mi povis kunporti la titolon al la universitato, kiu akceptis ĝin kaj donas al mi la samajn kondiĉojn de universitata profesoro.

**DB:** Bonvolu iom karakterizi la specifecon de via universitato kaj la rolon, kiun ĝi ludas en Ĉinio.

LHT: Beijing Broadcasting Institute (BBI) estas la sola universitato en Ĉinio, kiu sin koncentras al komunikado (tio inkludas televidon, radion kaj aliajn komunikilojn kaj teknikojn). BBI nun havas 70 fakojn je universitata nivelo kaj 12 000 studentojn. Ĝi estas unu el la plej gravaj el inter 100 universitatoj en Ĉinio. Multaj fakoj en ĝi estas la solaj en Ĉinio. La nomo de mia universitata departemento estas 'aplikata lingvistiko', kies ĉefaj esplor-direktaj estas 'lingva planado' kaj 'komputila lingvistiko'. La departemento estas la unua, kiu oni en ĉinaj universitatoj instalas pri aplikata (komputila) lingvistiko.

**DB:** Kiun statuson vi havas en la universitato kaj kiujn fakojn vi instruas al studentoj? Ĉu ankaŭ interlingvistikon?

LHT: Kiel profesoro de departemento, mi nun ĉefe instruas pri komputila lingvistiko. En tiu ĉi semestro mi instruas informadikon por lingvistoj kaj perkomputilan lingvan

## Okaze de la Tago de la Libro:

# Trezoroj en la reto



Fosi en brokantejoj eble donas ĝuon, sed estas ankaŭ temporabe. Tial pli kaj pli da libro-amantoj nun preferas vagi tra la interreto por serĉi malnovajn librojn.

Mi komencis la vagadon en Germanio. Pluraj libroj altiras atenton jam pro sia prezo. Jen unu brokantejo ofertas la libron de Bertha von Suttner, *For la batalilojn!* (1914), je prezo de 50 eŭroj. Alia, specialiginta pri „maldekstra“ literaturo, postulas por 56-paĝa verketo de Stalin, *Oktoobra revolucio kaj taktiko de rusaj komunistoj* (1932), 45 eŭrojn – kun la komento, ke ĝia apero estas paradoksa, ĉar Stalin persekutis Esperanton. La sama librojo ofertas „bibliografie ĉe ni ne dokumenteban“ libron: *Jarkvino de la Oktoobra Revolucio* de L. Sosnovski (1923), „alloge farita volumo... (kiu) krom la grandaj gvidantoj kiel Lenin kaj Trockij ofte montras la ordinaran popolon“. La prezo: ne malpli ol 225 eŭroj.

Kiam mi ekvagis tra la usona Abebooks, mi havis klaran celon. Mi serĉis kuriozaĵojn el la Malvarma Milito, nome la libron *Esperanto the Aggressor Language* (1962), kiun la usona armeo eldonis por la uzo en manovroj – por ke la soldatoj iom lernu la kvazaŭan „lingvon de la malamiko“. Pluraj libroj ĝin ofertas – la prezoj varias inter 75 kaj 15 dolaroj. Kelkaj titoloj ofertataj en la usona listo estas altprezaj, ekz. la Zamenhofaĵoj en traduko de Henry Phillips, *An Attempt towards an International Language* (1889, 125 dol.), *Per balono al la poluso de S.A. Andrée* k. a. (1930, 214 eŭroj), kaj la “tre rara” *Orienta Almanako* (1913, 275 \$). Po 150 \$ kostas *Fundamento de Esperanto* (1907) kaj *Originala Verkaro* (1929). Surprizas la prezo de 125 \$ postulata por *Vojaĝo inter la tempoj* de K. Kalocsay (1966), kiun la ofertanto same nomas “tre

rara”. *Kvin virinoj de Amoro* (1966) estas prezentita kiel *exquisite translation* (brila traduko) de japana klasikaĵo (60 \$). Bonajn prezojn, nome po 75 \$, atingas *Prozo ridetanta* de Raymond Schwartz (1928) kaj la romano de Ariĉima Takeo, *Senbedaŭre amo rabas* (1931); en la skalo sekvas *Atakoj kontraŭ gardenplantoj* de Paul Neergaard (1954, 55 \$); du eldonaĵoj de Stafeto: Pío Baroja, *La arbo de la sciado* (1973, 50 dol.), kaj *Japana kvodlibeto* (1965, 40 \$); krome, *Shakespeare in Esperanto*, bibliografio (“rara”) de Humphrey Tonkin (1966, 30 \$). Flatas min, ke la unua, broŝura eldono de *La danĝera lingvo* (1973) ŝajne valoras jam 45 dolarojn. Same multe kostas la dulingva (en Esperanto kaj la angla) *Manifesto de la Komunista Partio* (1908). Pli malriĉaj kolektantoj devas kontentiĝi per kultur-revolucia ĉinaĵo, *La malakordoj inter k-d-o Togliatti kaj ni* (1963), kiu kostas nur 1 dolaron.

Eble la plej multekosta esperantaĵo estas nuntempe *Dancu marionetoj!* de Julio Baghy (1927). Ĝin ofertas budapeŝta librojo. Temas pri lede bindita volumo el



*priblaboradon en prologo* por la dua kaj tria gradoj. Mi ankaŭ devas partopreni aliajn esplortemojn de la departemento, ĉefe projektojn pri komputila lingvistiko. Miaj studentoj lernos la bazajn konojn en la unua kaj dua jaroj pri informadiko kaj lingvistiko, ekde la tria jaro ili studos subfakon laŭ siaj interesoj el lingva planado kaj komputila lingvistiko. Interlingvistikon mi ankoraŭ ne povas instrui. Tamen mi jam diskutis kun la departementestro pri la eblo enkonduki interlingvistikon kiel studobjekton. Li konsentas pri mia propono. Eventuale la universitato eldonejo povus eldoni ankaŭ miajn verkojn pri interlingvistiko. Pri tio mi devas fari tre bonan planon. Fakte BBI kaj Esperanto havas bonajn rilatojn. Jam en la jaro 1964 BBI malfermis la unuan fakon pri Esperanto en ĉina universitato. Multaj Esperanto-parolistoj de Radio-Beijing iam estis studentoj de la Esperanto-fako de BBI. La fako ankaŭ iam revarbis novajn studentojn, eble du- aŭ trifoje. Alidiriĝe, BBI estas lulilo de profesiaj esperantistoj en Ĉinio.

**DB:** Ĉu vi jam ion povas diri pri viaj esplortaskoj?

LHT: Nun en la komenco mi havas malmultajn esplortaskojn.



la posedo de Baghy mem, kaj ĝi kostas 413 dolarojn. Similajn aŭ eĉ pli altajn prezojn atingas titoloj, kiuj laŭ la ofertantaj librojoj temas pri “antaŭuloj” de Esperanto. Ankoraŭ moderprezaj estas du germanlingvaj verkoj, la projektoj de J. Schipfer (1839, 143 eŭroj) kaj de Moses Païĉ (1859, 144 eŭroj). Sed la itallingva gramatiko de G. Kalmar pri filozofia lingvo (1773) kostas en Usono 450 dolarojn, dum ĝian germanan version eblas akiri kontraŭ 203 eŭroj. Same en Germanio, oni ofertas pioniran verkon pri telekomunikado: *Pasiteographie de Armand Charles Daniel de Firmas-Peries*, t.e. priskribo de la pazigrafio de Joseph de Maimieux (1811) – kaj postulas por ĝi 2606 eŭrojn.

Konstatante la iom altajn prezojn de tiaj inkunabloj, la Esperanta libro-amanto ne devas paniki. Mi vidis en la usona listo oferton de la ĉarma libreto *Rimportretoj* de Kalocsay por preskaŭ 60 dolaroj. Sur la pure esperantista merkato tiu libro kostas malpli. Vi havas ŝancon pli malkare akiri ĝin, se vi hazarde trafos ekzempleron dum vizito al la Libroservo de UEA. **Ulrich Lins**

Ili rilatas nur al komputila lingvistiko. Kompreneble, mi rajtas fari aliajn esplorojn laŭ mia prefero, por tio mi tamen esperas ricevi financon subtenon de la universitato. Mi devas zorgi plani la esplortemojn. La universitato ne rifuzos interlingvistikon, se oni povas liveri bonan programon.

**DB:** Mi supozas, ke necesas subteni vin en viaj klopodoj disvastigi interlingvistikon en Ĉinio. Ĉu vi havas iun ĉi-rilatan mesaĝon al interlingvistoj en aliaj landoj?

LHT: Dankon, tiaj subtenoj de aŭlandaj interlingvistoj certe estas necesaj. Fakte, se min menui estus subteninta dum la pasintaj jaroj, ne eblus al mi esplori interlingvistikon, kaj ankaŭ ne eblus al mi nun funkcii kiel universitata profesoro pri lingvistiko. Kiel konate estas tre malfacile por ĉinoj akiri eldonaĵojn el aŭlandoj. Mi esperas, ke miaj kolegoj kiel antaŭe povos daŭre subteni min kaj sendos novajn eldonaĵojn. Estus bone kaj utile, se ni havus kompletan materialkolekton pri interlingvistiko en Ĉinio. Mi ankaŭ ŝatus kunlabori kun aliaj universitatoj pri interlingvistiko, komputila lingvistiko kaj lingvoplanado. **(por Esperanto intervjuis Detlev Blanke)**



## Ivo Lapenna: Rigardu en la spegulo

*Eseoj memore al Ivo Lapenna.* Red. Carlo Minnaja. Kopenhago: [www.kehlet.com](http://www.kehlet.com), 2001. Sub aŭspicio de Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna. 417p. ISBN 87 87089 09 2. 25 cm. Fotoj. Kun kompaktdisko: 3 festparoladoj de Ivo Lapenna. 47 kontribuajfoj de 29 aŭtoroj. € 45,00.

En *viaj manoj kuŝas memorlibro, ne adorlibro*, skribas la redaktoro Carlo Minnaja en sia enkonduko al *Eseoj memore al Ivo Lapenna*. Ni bezonas tiajn memorlibrojn, ĉar Ivo Lapenna (1909-1987) certe meritas profundan pritraktadon. Sendube li estis unu el la plej gravaj gvidantoj de la movado, unu el la plej originalaj pensantoj pri la rolo de tiu movado en la ekstera mondo, kaj unu el la evidentaj modeloj por ĉiuj posteuloj, inkluzive tiujn kiujn oni nomas liaj kontraŭuloj.

Aliflanke estas malfacile trovi fidindajn informojn pri tiu homo, kiu tial restas iom nebula por multaj nuntempaj esperantistoj. Post kiam li forlasis UEA en 1974, ŝajnas daŭre ekzisti du tendaroj: tiu kiu kredas ke Lapenna konstruis la movadon, kaj tiu kiu kredas ke li detruis ĝin. Tial oni povas diri ke por ĉiuj esperantistoj de post tiu jaro (inkluzive la nunan recenzanton) estas preskaŭ neeble elfosi la veran Lapennan.

La Eseoj certe prezentas ŝpatojn por tia elfosado. Enestas kelkaj interesaj kontribuajfoj biografaj, ekz. de Minnaja pri la rilato de Lapenna al la junulara movado, aŭ de Ralph Harry pri la rolo de Lapenna en la strebado ligi la internacian lingvon al internacia juro. Enestas ankaŭ kelkaj belaj personaj rememoroj, kiel de John Wells, kiu ekzemple rakontas kiel li iam veturis tra la antaŭurboj de Londono kun Lapenna. Tiu ĵus lernis kiel konduki aŭton: "Li emis ripetadi al si anglalingve la devizaĵojn instruitajn de la stirinstruisto, ekzemple 'look in the mirror' (rigardu en la spegulo)".

Enestas multe da interesaj tekstoj, sed plej grave, enestas la tekstoj de kelkaj paroladoj de Lapenna mem, kiujn oni parte povas ankaŭ aŭskulti de akompananta kompaktdisko. La retorika talento de Lapenna ankorau ĉiam kaptas la atenton, eĉ se lia stilo en modernaj oreloj eble estis iom pompa.



La historio de la libro estas nekutima, kaj tio speguliĝas en ĝia strukturo. Kelkaj kontribuajfoj estis jam verkitaĵoj en 1984, por omaĝa libro okaze de la 75-a naskiĝdatreveno de Lapenna; tiu tamen neniam eldoniĝis. Antaŭ kelkaj jaroj la dano Torben Kehlet ekhavis la planon eldoni tiun ĉi 'memorlibron' (bedaŭrinde Kehlet mortis ĵus antaŭ ol la libro aperis). La redaktoro Carlo Minnaja petis kelkajn novajn kontribuantojn "ke ili verku laŭ propra plaĉo ene de temo nur larĝtraite antaŭfiksita". La vidvino (kaj tria edzino) Birthe Lapenna-Zacho aldonis kelkajn eseojn kaj fotojn el sia privata arkivo.

La kontribuajfoj tiel estas tre diversnivelaĵoj kaj diverstemaj. Enestas eĉ kelkaj eseoj kiuj nur tre flanke traktas aspekton de Lapenna. Malgraŭ ĉiu tiu laboro, la leganto ne povas ne havi la impreson ke sur kelkaj paĝoj tamen temas pli pri adorlibro ol pli memorlibro. Preskaŭ malestas la kritikantoj kaj mallaŭdantoj, tie ĉi oni skribas pri Ivo Lapenna preskaŭ nur pozitive.

Por neŭtrala leganto tiu tono suspektindas. Estas eble ke Lapenna estas unu el la plej gravaj esperantistoj el la historio de la lingvo; estas tre verŝajne ke oni siatempe traktis lin maljuste en UEA-rondoj. Sed la Eseoj estas tro pozitivaj por samtempe esti fidindaj.

Oni aŭskultas nur la amikojn, kiuj kompreneble rajtas voĉi sian opinion, sed oni dezirus aŭdi pli. Kio vere okazis dum la Hamburga UK en 1974? Kiaj estis la rilatoj de Lapenna kun siaj 'aliaj' du edzinoj? Kiuj el liaj ideoj ankoraŭ estas vere gravaj por la nuntempa movado, kaj kiuj eksmodiĝis aŭ perdis sian intereson?

Kompreni kaj memori homon iel similas konduki veturilon: oni vidu ĉiujn flankojn. Bedaŭrinde la *Eseoj* precipe rigardas tra la antaŭa glacio, kie staras la geniulo; sed ili forgesas la retrospegulon, kie oni estus vidinta la homon.

Marc van Oostendorp

## Brile kaj koncize pri domkonstruado

*Konstruu vian domon.* Gilbert R. Ledon. Campos do Jordao, Teknikaj Kajeroj n-ro 6, eldonita de la aŭtoro, 2002. 39p. 22cm. € 4,80.

En 40 paĝoj kaj per preskaŭ sama nombro da figuroj, la aŭtoro brile – koncize sed sufiĉe komplete – eksplikas bazaĵojn de domkonstruado de fundamento ĝis tegmento kaj de teren-elekto ĝis material-uzo. La libreto estas specife instrua al laikoj pri la fako. Pro la abundo je fakaj vortoj ĝi pli generale utilas al ĉiuj kiuj ŝatus ekkoni la Esperantajn terminojn

de diversaj partoj kaj detaloj de konstruaĵoj k.s. Ilian nekonon ĉe multaj esperantistoj, fakspertoj aŭ ne, la aŭtoro celas malpliigi. La teksto klaras kaj foje spritas. La ekzemploj sufiĉe internaciecas, kvankam ili loke koloriĝis pro liaj spertoj de konstruado en Brazilo, kio des pli interesas kaj ĉarmas.

Fabien van Mook



## Ĉinaj fabloj pri multaj temoj el du jarmiloj

*Cent ĉinaj fabloj.* Kompilis Gao Ĵingmin. El la ĉina tradukis Yu Tao kaj Wang Lihua. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1999. 147p. ISBN 7 5052 0443 2. 18cm. Ilus. Fabloj el du jarmiloj. € 6,00.

Mi mem legis kaj ŝatis ĉi tiun libron, ĉar en ĝi estas multaj temoj: gajaj, malgajaj, ridigaj, stultetaĵoj, saĝaj. Ĝi havas koncizajn rakontetojn, meze malpli ol du-paĝajn, kun plaĉaj ĉin-stilaj bildoj.

Gaja estas *Serĉado de litopiedo* pri ligno-hakisto malplenmane reveninta el arbaro, ĉar neniu arbotrunko kreskas suben.

Malgaja estas *Vian daviĝo* lupu kiam hoke pendigita viando allogas lupon, kiu mem surhoke pereas.

Ridinda estas *Lernado de skribado* en kiu analfabeto eklernas skribi numerojn: - unu; = du,



/// tri. "Tio sufiĉas!" li krias: "Maldungu la instruiston!" Sed tiam, eĉ post tut-taga laboro, li ne sukcesas finskribi invitilon al s-ro Wan (dek mil), kaj li jam foruzis kvincent paper-pecojn!

Stulteta estas *Naŭkapa birdo*, ĉar ties kapoj batalas inter si por ricevi manĝon kaj tiel ĝi pereigas sin mem.

Saĝa estas *Aĉaj rompitaĵoj*; tiu rompitaĵo eĉ dudek saĝojn unuope, poste petante la filojn rompi 19 kune en fasko. Tio instruas ke multaj homoj kune defendas sin kune pli bone ol dise. Paĉjo diras ke ekzistas slogano por tio: "Unueco estas forto".

Karina MacGill (10-jara)

## Libro ne nur pri steloj kaj ĉielumado

*Astronomia almanako 2/2002.* Kolektlibro de la Astronomia Esperanto-Klubo, numero 2 (2002). Red. Aleksander Mikiŝev. 56p. € 12,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Ĉu vi volas scii la horon dumnokte, simple rigardante la stelojn? Ĉu vi interesiĝas pri la konstruado de sunhorloĝoj? Ĉu vi miras kiamaniere la astronomoj malkovras planedajn sistemojn je centoj da lumjaroj for de nia tero? Se vi ŝatas observi la noktan ĉielon aŭ se la scienca aplikado de Esperanto ekscitas la verdan parton de via koro, la dua eldono de la Astronomia Esperanto-Klubo (AEK-o), *Astronomia Almanako 2002*, estas por vi.

En tiu 56-paĝa verko vi trovos artikolojn ne nur pri la antaŭe menciitaj temoj, sed ankaŭ pri astronomado, planeda observado, la mistero de la varmega sunkorono, la ĉasado de meteoroj kaj la studado de la minoraj planedoj. Tamen, la



*Astronomia Almanako 2002* ne estas simple libro pri steloj kaj ĉielumado. Ĉiu artikolo detale eksplikas sian temon per ekzemploj, bildoj, diagramoj, formuloj aŭ datumlistoj. Eĉ se vi estas astronomo, vi trovos aktualajn teoriaĵojn kaj praktikajn konsilojn, kiuj plifaciligos viajn ĉiunoktajn ĉiel-aventurojn. La *Astronomian Almanakon 2002* vi certe ofte uzos dum la venontaj monatoj, dank' al la kalendaro kiu aperas en ĝiaj lastaj paĝoj, kie listiĝas la plej gravaj astronomiaj eventoj de la dua duono de 2002 kaj la tuta 2003. Tiel vi povos antaŭprepari vin por la plej interesaj kaj observindaj fenomenoj de la ĉielo.

Efthimios Mavrogeorgiadis

## Sen bru' sed ne sen ĝu'

*Sen. La akustika albumo de Persone.* Tekstoj kaj muziko M. Wiese kaj B. Wennergren. Donnevill (Francio): Vinilkosmo, 2002. KD: 40:04 minutoj + tekstlibreto 12p, 11 kantoj. € 16,50.

Nova albumo de la sveda muzik-triopo Persone estas ĉiam atentinda en Esperantio pro ĝia gvida rolo en la moderna originala Esperanta muzikkulturo. La albumo *Sen* sekvas kaj pluesploras la vojon de la lastaj du albumoj *Povus esti simple* kaj ... *sed estas ne* laŭ poezio kaj baza muzikeco, sed laŭ muzikarango rimarkeble diferencas. Kiel indikite en la kromtitolo, tiun ĉi albumon oni registris sen elektronikaj instrumentoj, kaj sen drumo. Ĝi ne estas rokmuziko.


La poezio de ĝia komenco estas unu el la fortoj de Persone, kaj la akustika arango bone servas por ĝin reliefigi. Ĝi

estas pensiga, lingve neriproĉebla (unu el la triopo ja estas akademiano) kaj ofte bela poezie. Preskaŭ ĉiu kantaĵo temas pri aŭ tuŝas iun mankon: esti sen la amatino, sen amiko, sen Dio, eĉ sen inspiro verki bonan poemon. La muziko sekvas tiun melankolian tonon konatan ĉe Persone, sed sen la pli "bruaĵ" instrumentoj, la efekto ŝajnas pli hante bela kaj pli rev-melankolia.

La grata voĉo de Martin Weise ĉefrolas en liaj kantaĵoj kies stilo muzika kaj poezia facile distingeblas disde tiu de la kantaĵoj verkitaĵoj de Bertilo Wennergren, en kiuj pli aŭdeblas lia glata voĉo. En antaŭaj albumoj, mi emis

preferi tiujn de Bertilo, sed nun kiam mi povas aŭdi kantaĵojn de Martin en pli egala prezento, sen la akompana bruo de amplifikiloj kaj drumo, liaj poluritaĵoj kaj pli melodiaj kantaĵoj tre plaĉas al mi. Entute, tre aŭskultinda kaj ĝuinda albumo.

Joel Brozovsky





## Eventoj ĉesas aperi

Post 11 jaroj ĉesas aperadi la 2-semajna gazeto *Eventoj*, legata en 60 landoj. La fondinto kaj la eldoninto László Szilvási klarigas la kialojn jene:

La mondo daŭre ŝanĝiĝas. Nuntempe la informfluo ege rapidiĝis, kaj la uzado de interreto kaj retpoŝto iĝis ĉiutagaj laboriloj, same kiel papero kaj skribilo.

Ne nur *Eventoj*, kaj ne nur la Esperantaj revuoj, sed eldonantoj de ĉiuj paperaj gazetoj devas analizi sian situacion kaj rolon lige al la telekomunikacia revolucio. La informfluo en Esperanto iĝis multe pli rapida kaj operativa ol antaŭe, UEA iĝis multe pli malfermita,



ĝisnunaj dogmoj kaj baroj falas tagon post tago, kaj la strukturo de komunikado signife ŝanĝiĝis. La antaŭa rolo de *Eventoj* estas plenumita, kaj ni decidis kun fiero kaj kontento fermi – aŭ almenaŭ suspendi – la 11-jaran periodon de la eldonado.

Fine de la jaro 2002 ĉesos nur la aperado de la papera gazeto, daŭre funkcios la retpoŝta novaĵ-servo *Ret-Info* kaj *Plena Kalendaro*.

## Simpozio en universitato

De la 14-a ĝis la 16-a de junio en la universitato de Passau, Germanio, okazis simpozio sub la temo "Ĉu Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo?". Organizanto estis la studenta asocio "KuWi-Netzwerk" ([www.kuwi.de](http://www.kuwi.de)). Patronis Günter Verheugen, ano de la Eŭropa Komisiono, kaj Rainer Hertrich, prezidanto de la konzerno EADS.

Dank' al Franz Josef Braun, la organizantoj invitis d-ron Reinhard Fössmeier, prezenti trihoran seminarion pri Esperanto.

Ĉar la intereso estis granda kaj la maksimuma kapacito nur 18 lokoj, necesis rifuzi kelkajn. Tamen 22 gestudentoj prezentis viglajn demandojn kaj opiniojn. Precipa intereso estis pri la baza arkitekturo de la lingvo, sed ankaŭ pri la praktikaj ebloj de apliko, kaj ĉu entute eblas ĝin apliki "antaŭ la fina venko".

Ekestis demandoj pri la ebloj akiri pliajn informojn, kio ne prezentas problemojn, ĉar ĉiuj partoprenintoj havas aliron al interreto. Do eble ili pli profunde okupiĝos pri la Internacia Lingvo.

Generala miro estis, ke "oni" tiom malmulte informas pri la fenomeno Esperanto. Sed la demando, kiu "devus" fari tion kaj per kiuj rimedoj, ne trovis kontentigan respondon.

Reinhard Fössmeier

foto: Reinhard Fössmeier



## El Popola Ĉinio

La reta *El Popola Ĉinio*, daŭriganto de la pasinta revuo *EPĈ*, tamen kun pli rapidaj informoj, pli riĉa enhavo kaj pli belaj fotoj, atentas pri kulturo, socia vivo kaj Esperanto, kaj servas tiujn, kiuj amas Esperanton kaj pacon kaj deziras koni Ĉinion.

La reta EPĈ havas 17 partojn: *Novajoj, Socio, Kulturo, Esperantujo, Inter Ni, Legu kaj Ridu, Ter-vilaĝo, Homaro kaj Naturo, Turismo, Ekonomio, Scienco kaj Eduko, Kuirarto, Kinejo, Muzikejo, Pentraĵoj, Metiarto, Ludejo*, kun pli ol 50 rubrikaj entute. Krome, estas ankaŭ specialaj raportoj pri interesaj temoj, kiel pri *Tibeto, Olimpikoj en Pekino, Nacimalplimulto de Ĉinio, Koncize pri Ĉinio, APEK en Ĉinio* ktp. Ĝi estas legebla per la retejoj:

<[www.espero.com.cn](http://www.espero.com.cn)>

<[www.chinareport.com.cn](http://www.chinareport.com.cn)> kaj

<[www.china.org.cn/world](http://www.china.org.cn/world)>

Estas ĉiam bonvenaj viaj kontribuajoj, proponoj kaj sugestoj pri la enhavo, paĝaranĝo kaj lingvaĵo. Kontaktiĝu kun: El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio; rete: <[epc@china-report.com](mailto:epc@china-report.com)> aŭ <[elpc@china.com](mailto:elpc@china.com)>.

## Bankrotis

### Monda Turismo

La 22-an de septembro 2002 okazis la 13-a eksterordinara Ĝenerala Kunveno de *Monda Turismo*, dum kiu oni decidis, pro ekonomiaj kialoj, dissolvi la asocion. Samtage oni fondis novan Internacian Klubon *Esperantotur*, kiu daŭrigos la turisman agadon de *Monda Turismo*.

## Ekzamenoj en Hungario

De la jaro 1995 okazas en Hungario interesa fenomeno pro la apero de leĝo pri deviga ekzameno pri fremdaj lingvoj en altlernejoj kaj universitatoj. Ekde tiu tempo aŭbrubte kreskis la nombro de la studentoj, kiuj trapasas ŝtatan lingvoekzamenon.

En Hungario, por ricevi diplomon en altlernejoj/universitatoj oni devas plenumi tri kondiĉojn: akiri certajn studunuojn, verki diplomlaboraĵon kaj prezenti dokumenton pri la kono de unu-du fremdaj lingvoj.

Feliĉe en Hungario jam de la sesdekaj jaroj aperis pluraj decidoj de la registaro, laŭ kiuj Esperanto estas egalrajte instruebla kiel aliaj fremdaj lingvoj. Sekve kiam aperis la leĝo pri la lingvoekzamenoj, oni rajtis elekti ankaŭ Esperanton. La kialoj estas konataj: oni bezonas malpli da tempo, peno kaj mono por akiri la diplomon pri ŝtata lingvoekzameno pri Esperanto.

Plimulto de la gestudentoj dum la lastaj jaroj trapasas ŝtatan lingvoekzamenon pri la lingvoj angla, germana kaj franca. Sed en 2002 sur la populareco-listo la trian lokon okupis Esperanto, preninte la lokon de la franca lingvo!

Dum la pasintaj 7 jaroj al la ŝtata lingvoekzameno el Esperanto aliĝis entute 6484 personoj laŭ la subaj kategorioj (Baza-Meza-Supera-Sume): 1995: 8-576-18-602. 1996: 25-485-11-521. 1997: 29-512-4-545. 1998: 50-509-5-564. 1999: 113-462-8-583. 2000: 168-1455-4-1627. 2001: 295-1721-26-2042. Sume: 688-5720-76-6484.

Nun oni povas akiri diplomon nur en unu instituto (kaj en ties filioj dise en la lando), en *Idegennyelvi Továbbképző Központ* (Fremdlingva Pluperfektiga Centro) kiu akreditis la E-an lingvoekzamenan sistemon. Jen kelkaj indikoj de la ĵus pasinta lernoĵaro. Inter septembro 2001 kaj junio 2002 okazis kvinfoje skribaj ekzamenoj sur baza, meza kaj supera gradoj. Se ni komparas la rezultojn de la ekzamenoj pri Espe-

ranta kaj germana lingvoj, ni vidas ne grandan diferencan. Al la mezgrada ekzameno aliĝis 2458 personoj kaj 59% el ili sukcesis. Samtempe ekzameniĝis 24 604 personoj pri la germana kaj el inter ili 49%-oj sukcesis.

La ekzamenoj devas solvi kvin diversajn taskojn: testo, tradukado al fremda lingvo, konceptado en fremda lingvo, traduko nacilingven kaj kompreno de fremdlingva teksto. La rezultoj montras, ke kvar taskojn la ekzamenitoj pri Esperanto pli bone solvis ol la ekzamenitoj pri la germana lingvo. Sajnas, ke la lernantoj de Esperanto plej bone progresas en la kompreno de la teksto, supozeble pro la simpleco de la gramatiko de Esperanto.

Oszkár Princz

## Malkovroj pri Emilio Herrera

Dum ordigado de la *Arĥivo Emilio Herrera* en la Altlernejo pri Aeronautiko de la Madrida Politeknika Universitato oni malkovris dokumentojn en aŭ pri Esperanto. La arĥivo omaĝas la generalon Emilio Herrera.

Emilio Herrera estis multflanka homo: pioniro de la aemavigado per balonoj kaj aviadiloj, sciencisto, militisto kaj politikisto. Li estis la unua kiu en 1914 transflugis la Gibraltaran Markolon en aviadilo; li partoprenis la unuan vojaĝon per zepelino inter Germanio kaj Novjorko, kaj poste el Eŭropo al Sudameriko. Li planis vojaĝon al la stratosfero per malfermita balono, kiun la hispana milito malebligis kiam ĝi estis preskaŭ preta.

S-ano Herrera havis fortan intereson pri sciencio, kunlaboris en la esploroj pri aviado kaj interesigis pri matematiko kaj fiziko. Li fondis aeronautikan laboratorion apud Madrido, kaj estis la unua direktoro de la unua hispana Altlernejo pri Aerotekniko. Li estis ano de la hispana Akademio pri Sciencoj.

Dum la hispana interna milito li restis lojala al la respublikana registaro. Li estis unu el la malmultaj militistoj kiuj atingis la gradon de generalo. Post la milito li ekziliĝis al Parizo, kie li daŭrigis sian



## ĈIUMONATA SOCI-KULTURA REVUO KUN LITERATURA SUPLEMENTO JARFINE

\*\*\*

TRA ESPERANTUJO: Faktoj, problemoj, komentarioj  
CIVILIZO: Kia estis, estas kaj estos la mondo?  
ESPERANTO: lingvo, komunumo, literaturo  
Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj  
Ĉiujara proklamo de la Esperantisto de la Jaro

\*\*\*

Abonebla kontraŭ 25 eŭroj ĉe UEA kaj landaj perantoj. Provekzemplero ĉe RU-236039 Kaliningrad, p.k.1248, Ruslando

sciencan karieron, kunlaborante en francaj revuoj; li laboris kiel scienca konsilanto ĉe Unesco kaj politikisto: ministro de la hispana registaro en ekzilo, kaj ties prezidanto inter 1960-62. Emilio Herrera mortis en Genevo, en septembro 1967. Esperanton li lernis ĉirkaŭ 1911. Li partoprenis la Internacian Konferencan por la apliko de Esperanto en la sciencio, en 1925 en Parizo, kaj kunlaboris kun ISAE pri la verkado de aeronautika terminaro. En la menciita Arĥivo troviĝas dokumentoj pri tiu lia

intereso, kun leteroj, artikoloj kaj diversaj movadaj eroj en nia lingvo. Aperis du liaj artikoloj en la hispana pri Esperanto kaj scienco, resp. la aerlinioj. Konservigis kelkaj personaj leteroj en E-o, inkluzive de malneto de letero de li mem skribita, kaj pluraj aliaj dokumentoj. La Arĥivo "Emilio Herrera" havas retpaĝaron: <http://eherrera.aero.upm.es/>; post iom da tempo tie aperos ĉiuj dokumentoj en formato PDF.

Tonyo del Barrio





**Antonia GALBANY de CRIACH** (1907-2002), la unua virino distingita per la medalo "Klara Silbernik" de la "Hispana E-Muzeo", mortis en Cella (Hispanio). Kun sia edzo Antonio ŝi aĉetis lokalon, kiu nun estas propraĵo de la Centro de Esperanto Sabadell.

**Raymond GONIN** (1913-2002), fervora blinda esperantisto, honorigita per la medalo *Palme Académiques*, multjara prez. de Franca Unuiĝo de Blindaj E-istoj kaj ĝen. sekretario/prezidanto de Ligo Internacia de Blindaj E-istoj, redaktoro de *Esperanta Ligo*, artisto, komitatano de UFE, kursgvidanto, Delegito de UEA kaj Honora membro, forpasis la 11-an de aprilo 2002.



**D-ro Jerzy W. JARMASZ** (1949-2002) mortis en Otavo (Kanado). Li membris en UEA de 1964, inter 1972-95 estis ĝia delegito.

**Anĝelo MELLINI** (1934-2002), iama sekretario de Svisa Esperanto-Societo, mortis la 10-an de septembro en Hermetschwil (Svislando).

**François MESPLÈDE** (1904-2002), membro de 1973, fakdelegito pri turismo (1977-1999), forpasis la 30-an de junio en Arcachon (Francio).

**NGUYEN Minh Kinh** (1914-2002), Honora Membro de UEA, kunfondinto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA-1956), forpasis la 17-an de aŭgusto en Hanojo. Li publikigis beletrajn tradukojn ĉe Fremdlingva Eldonejo en Hanojo. En 1999 aperis lia 1400-paĝa *Granda vortaro vjetnam-Esperanta*.

**Ragnhild NIKLASSON** (1908-2001), membro de 1951, iama FD pri kristanismo, forpasis la 19-an de novembro en Örebro (Svedio). En la sveda sekcio de KELI ŝi estis kasistino, sekretario kaj prezidantino (1977-80), de 1993 ĝia honora membro.

**Edo TADDEI** (1940-2002), fakdelegito de 1963, forpasis la 17-an de junio en Florenco (Italio). Talenta deklamisto, lastatempe li aktivis precipe en ERA kaj italigis KD-kurson pri Esperanto el Brazilo.

**Ruth TUMMAN** (1919-2002), edzino de la forpasinta Gerard Tuffman, fondinto de E-klubo en triagrada edukujo en Melburno, iniciatinto kaj kunorganizanto de la Kongreso de Aŭstralia E-Asocio en 1990, mortis en Melburno (Aŭstralio).

**Cyril VRBIK:** la 22-an de oktobro 2002 estis murdita homo kun larĝe amanta koro, mirinda, gastigema, afabla kaj kredoforta sacerdotino, multjara membro de IKUE, parohestro en Maria-pilgrimloko Dub nad Moravou (Ĉeĥio). Post la ĉi-jara 55-a Kongreso de IKUE li en sia paroĥejo gastigis internacian Renkonton de IKUE-junularo.



# Ralph Harry

(1917 - 2002)

Laŭ siaj naskiĝgrupo kaj kariero Ralph Lindsay Harry apartenis al tiuj, kiuj ŝajne malplej bezonas Esperanton.

Li deveno estis angla-aŭstralia: la patro estris gimnazion kaj la patrino estis el altranga familio de politikistoj. Ralph tiel elstaris kiel lerneĵano kaj poste studento, kaj intelekto kaj sporte, ke li gajnis la plej deziratan stipendion, *Rhodes Scholarship*, kiu ebligis studadon de juro en la tiutempe plej prestiĝa angla universitato, tiu de Oksfordo.

En la 1930-aj jaroj Ralph aktivis en kristanaj rondoj kaj emis al pacifismo; dum tiu periodo li eklernis Esperanton (1937). Li ĉeestis kongreson de la Monda Kristana Junulara Movado en Hago la tagon, kiam anonciĝis la germana invado de Pollando. Tiam li ĵuris: *Mi persone neniam perdos mian fidon je la fina venko de paco kaj justeco...* Sed la hororoj de la Dua Mondmilito igis lin dubi la ekziston de Dio kaj la validecon de pacifismo. Li do celis konstrui pli bona mondo per nerevolucia agado *ene de la institucioj*.

Ralph spertis tre sukcesan karieron kiel diplomato. Li estis membro de la aŭstralia delegitaro, kiu helpis krei la strukturon de UN tuj post la milito. Li fieris pri sia kontribuo al la vortumado de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la Ĉarto de UN kaj de la internacia mara juro. Poste li agis kiel la aŭstralia ambasadoro en diversaj landoj, inter ili Sud-Vjetnamio dum la terura milito tie, kaj fine li reprezentis sian landon kiel ambasadoro ĉe UN.

Dum la tuta plenkreskula vivo Ralph estis fervora esperantisto, kvankam en tio li restis sola kaj en la parencaro kaj inter la kolegoj. Li tradukis gravajn dokumentojn de UN; antaŭ la Olimpikaj Ludoj de Munkeno

li eldonis kaj disdonis multlingvan broŝuron de sportaj terminoj kun Esperanto kiel la baza lingvo; li laboradis dum jardekoj pri vortaro de specife aŭstraliaj kaj nov-zelandaĵaj vortoj. Antaŭ tre mallonge li eldonis kolekton de *flugilhavaj vortoj* el multaj lingvoj kun traduko en Esperanton. Li entuziasmis pri briĝo: do – laŭ li kompreneble – li ellaboris terminaron de tiu ludo en la internacia lingvo. Eble lia plej grava laboro estis la *Harry-Plano* por enkonduki Esperanton en UN en sesjara periodo. Kaj kiam li publikigis kolekton da memoraroj en 1983, *The Diplomat who Laughed* (la diplomato, kiu ridis), li daŭre aludis al Esperanto.

Kontraste al aliaj esperantistoj-diplomatoj/politikistoj tre konataj ekster niaj vicoj (ekz. Privat, Jonas, Enderby), Ralph Harry neniam ambiciis postenon en iu el niaj internaciaj movadoj, sed en 1960-1 kaj dum

multaj jaroj post la emeritiĝo li prezidis la aŭstralian landan asocion, prelegis, propagandis, kaj agis en la ekzamena komisiono. Li konstante verkis artikolojn kaj ŝercajn analojn laŭ la modelo de Raymond Schwartz, kaj multon kontribuis al la traduklaboro de Aŭstralia antologio. Multajn financajn projektojn de AEA li lanĉis per malavara kontribuo de duono de la celita sumo.

Jam frue dumviva membro de UEA, Ralph en 1967 membriĝis en la malgranda grupo de la Honora Patrona Komitato. Lia alta, impona figuro tre mankas al la esperantistoj de Aŭstralio kaj la tuta mondo.

Trevor Steele



# Laste aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insiĝnoj k.s. 19% pro la aldona valora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

**Adventures in Esperantoland.** Ralph Harry. En la anglan trad. de la aŭtoro. Redfern: AEA, 2001. 132p. ISBN 0 9586651 3 3. 20cm. Travivaĵoj de diplomato per Esperanto. Bazita sur radio-paroladoj. € 7,80

**Antologio de la serba skriba poezio.** Red. Zivko Ivanović. El la serba trad. Z. Ivanović. Beograd: La tradukinto, 2002. 238p. ISBN 86 903465 0 3. 22cm. Kun multaj tupaĝaj fotoj. Preskaŭ 200 poemoj de 55 poetoj spanas 9 jarcentojn de riĉa nacia poezio; kun notoj pri la aŭtoroj; ŝika grafika prezento. € 12,00

**Brusela bubo, La. Cisko kaj Vinjo.** Willy Vandersteen. El la flandra trad. Bert Boon, Marc Vanden Bempt. Antwerpen: Standard Uitgeverij k.a. 2002. 58p. 26cm. Kolorilus. € 7,80

**Esperanto per iom pli ol 200 vortoj.** A. Kerbel. Hajfo: La aŭtoro, 2001 (2-a eld.). 224p. 21cm. Ilus. Kun facil-stila rerakonto de *Aelita* de A. Tolstoj. € 8,10

**Esperanto per iom pli ol 300 vortoj.** A. Kerbel. Hajfo: La aŭtoro, 2001 (2-a eld.). 205p. 21cm. Ilus. Kun facil-stila rerakonto de *Batalo por laĵro* de J.H. Rosny. € 8,10

**Esperanto per iom pli ol 500 vortoj.** A. Kerbel. Hajfo: La aŭtoro, 2001 (2-a eld.). 262p. 21cm. Ilus. Lernilo kun facil-stila rerakonto de *Trezorinsulo* de Stevenson. € 10,20

**Esperanto - La langue internationale. Metodo / Méthode 12.** Paris: Espéranto-France, 2000. 30p. ISBN 2 9507376 2 5. 21cm. Daŭrigo de Metodo 11; 12 lecionoj kaj akompana sonbendo. € 18,00

**Esperanto - La langue internationale. Metodo / Méthode 11.** Paris: Espéranto-France, 2001 (5-a eld.). 76p. ISBN 2 9507376 3 3. 21cm. Rapida metodo en 11 lecionoj surbaze de la plej oftaj 500 vortoj; kun akompana sonbendo. € 15,00

**Flor' kaj kanto. Kajeroj pri meksika kulturo.** Div. El la hispana trad. J.J. Schmitter kaj J.L. Gutiérrez. Meksiko: Meksika Esperanto-Federacio, 1998. 33p. 21cm. La unua kajero de serio prezentanta la riĉan meksikan kulturon; enhavas poemojn el 4 jarcentoj. € 3,00

**Jubilea festlibro. 25-jara jubileo de Esperanto-Societo Sudharco.** Herzberg: Esperanto-Gesellschaft Südharz, 2002. 148p. 30cm. Dulingva: germana k Esperanto. Raportoj, gazetartikoloj, leteroj, kantoj, legendoj, ĉio abunde ilustrita. € 9,90

**Kobaltoblu'. Azul-cobalto.** José Meira Mendonça. El la portugala trad. Waldson Pinheiro. Natal: Potigvara E-Asocio, 1994. 99p. 21cm. Dulingva

**Lequel Ligo-Portilla** (portugala-Esperanta). Triparta (Eros, Thanatos, Logos) poemo de sentema brazila poeto. € 3,30



**Maigret kaj la maljuna damo.** Georges Simenon. El la franca trad. Daniel Luez. Kaliningrad: Sezonoj, 2002. 128p. 20cm. Ĉi-foje la fama komisaro forlasas Parizon kaj iras al la marbordo por enketi pri krimo. € 12,00

**Neenio estas pli kiel antaŭe.** G.P. Bilong Bilong. Fondadoj Afriko de UEA, 1997. 40p. 21cm. Scenoj el la ĉiutaga vivo de nuntempa Afriko. € 3,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

**Nouveau cours d'espéranto. La langue internationale avec ou sans professeur.** E. Ludwig, R. Triolle. Paris: Espéranto-France, 2001 (3-a eld.). 194p. ISBN 2 9507376 4 1. 21cm. Lernolibro por aŭtoididaktaj, kun akompana sonbendo. € 21,00

**Poŝvortaro Esperanta-rumana kaj rumana-Esperanta.** Ionel Onet, Cluj-Napoca: Dacia, 2002. 251p. ISBN 973 35 1497 7. 17cm. La unua moderna E-poŝvortaro por rumalingvanoj kun pli ol 5500 kapvortoj en ambaŭ direktoj. € 4,50

**Sentinelle, La: 1921 1-5.** Verkaro de E. Privat.



Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds / Svidniko: Arĥivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 297+10+62p. 28cm. Franclingva. 131 mallongaj artikoloj pri sociopolitikaj temoj, pluraj el ili pri Esperanto. € 34,50

**Sentinelle, La: 1922 1-5.** Verkaro de E. Privat. Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds / Svidniko: Arĥivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 343+10+68p. 28cm. Franclingva. 154 mallongaj sociopolitikaj artikoloj, multaj pri Esperanto (i.a. antaŭ la Ligo de Nacioj). € 34,50

**Sentinelle, La: 1923 1-5.** Verkaro de E. Privat. Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds / Svidniko: Arĥivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 410+10+73p. 28cm. Franclingva. 185 mallongaj jurnal-





Pasporto al la tuta mondo 136 Planned Languages 213 Por la Praktikantoj 107 Raporto el Japanio 3 207 Raporto el Japanio 4 207 Sunleĝo 207 Tago kiam Jesuo... La 140 Terminologia guidilo 127 Togolando tabelas 107, 132 Vojaĝo en E-lando 160 Zur Geschichte des Deutschen... Libroservo UEA 226, 229 Liĝca, L. 107 Lima, T. 176, 186 Lindbloom, B.M.K 133 Lindstedt, J. 134, 258 Lineckij, M. 236 Lingva angulo 32, 201 Lingvaj etudiloj 22, 46, 94, 118 Lingvaj rajtoj 104, 123, 155 Lins, M.N. 37, 129 Lins, U. 113, 250 Lipari, M. 18, 99, 100, 124, 165, 173, 183, 220 Literatura 21 Litovio 19, 20, 133, 165 Liu, H. 250 Lioancy, T. 249 Londono 18 Long, K. 116 Long, N.D. 113 Longue-Épée, C. 183, 212 Loose, W. 210 Lopez, D.V. 162 Lubović, A.T. 181 Luez, D. 90 Luin, F. 9, 231 Luksemburgio 84, 165 Lunazzi, J. 183 Lundberg, H. 9, 16 Luz, F. 12

M MacAoidh, G. 231 MacGill, K. 253 MacGill, S. 133, 136 MacKilgin, N. 114 Maizzen, H.M. 39, 203 Makedonio 19, 67, Malajzio 16 Malanda, E. 234 Malaŝenko, A. 237 Malferma Tago 79, 199, 229 Malovec, J. 202 Malto 20, 165 Maltsev, S. 237 Mandrak, S. 133 Mandrik, M. 21 Martček, S. 2, 7, 22, 26, 36, 46, 50, 70, 74, 94, 98, 118, 122, 128, 142, 146, 166, 169, 170, 174-178, 180, 182, 186-190, 194, 195, 200, 206, 212, 213, 214, 218, 238, 242, 260

Martin, J. 56 Martin, L. 115 Martini, R.C. 90 Martello, P. 18 Martini, H. 132 Massaia, B. 108 Masson, H. 14, 17, 63, 108, 34 Matanović, J. 159 Mátiné, A. 81 Mattos, F. 183 Matthias, U. 15, 55, 90, 160 Mattos, G. 39, 174, 183, 231 Mattos, R. 186 Maurer, B. 91 Mavrogeorgiadis, E. 67, 253 Mayer, H. 43 Mazarétegos 92 McCoy, R. 226 McLinen, A. 205 Meksikio 220 Melichárková, J. 183 Melnikov, V. 67, 198, 237 Membraro de UEA 156, 157 Mendez, C.P. 115 Meo, R. de 110 Mešić, S. 68, 130, 234 Micard, H. 248 Mikišev, A. 253 Milanez, J.V. 114 Milojević, S. 36, 129, Minajna, C. 215, 252 Močnik, L. 258 Modan, D. 207 Moerbeek, R. 116, 129, Molina, E.S. 183 Molle, G. 148 Monda Turismo 254 Mongolio 67 Montagner, A. 38 Mook, F. van 252 Moon, B. 173

Morales, J.C. 80, 172, 174 Moreira, A. 182, 185 Morena, A. 174 Mosele, E. 212 Mosonyi, E. 173 Mosonyi, I. 173 Moya, G. 38 Muglietti, S. 165 Mushiak, H. 210 Muziko 87, 116, 138, 140, 232, 253

N Nabbulsi, N. 132 Najbaro, B. 115 Najera, F. 93 Naturkuracado 84 Natuckij, M. 236 Nederlando 13, 16, 21, 68, 92, 105, 112, 124, 234 Neeragaard, J. 65, 130, 250 Nelken, O. 210 Nemere, I. 160 Nesbitt, W.J. 106 Ngoc T.Q. 113 Niiemi, L. 113 NicAoidh, M. 140 Nilsson, L.H. 132 Nöll, R. 131 Nomura, T. 68 Nordioleff, B.19 Norvegio 221 Norwell, S.T. 125 Nov-Zelando 104, 133, 221 Novoblišká, V. 19 Nowakowska, A. 35 Nuessel, F. 134 Nüesch, W. 230

O Dunne, V. 236 O'Riain, S. 212 Oceano 133 Ockey, E. 127 Oficeja komisiono 129 Oficiala informilo 43, 85, 111, 139, 163, 211, 235, 259 Oliva, E. 92 Oostendorp, M. van 163, 252 Orellana Rojas, A. 62, 65, 89, 91, 113, 131, 132, 183, Orłowska, P. 83 Ortiz, R. 92 Ošlak, V. 210 Osibov, I. 36, 75, 129, 130, 174, 190, 206 Oryntsetseg, O. 67, 221

P Pacheco, J.A. 62 Pagano, G. 68 Pagliaroli, F. 90 Paghmov, S. 115 Paragvaio 162 Parkvall, M. 162 Pazarszek, J. 115 Pasporta Servo 68, 162 Patagionio 138 Patera, J. 115 Pauli, E. 203, 206 Pennacchietti, F. 38 Perreira, C. 12 Perray, M. 20 Persones 253 Petrović, R. 16, 133, Petrović, S. 9, 16 Peyraut, I. 69 Philipsson, R. 123 Pietrzak, B. 83, 178, 190 Pilgler, W.P. 205 Pilipović, S. 177 Pinheiro, C. 39 Piriol, G. 55, 90 Piron, C. 51, 160 Piton J.R. J. 4, 84, 183, 193 PITT, A. 115 Polák, Z. 237 Poláková, E. 212 Polerani, G. 17 Pollanz 17, 20, 38, 40, 83, 86, 107, 162, 221, 236, 258 Poltronieri, H.M. 89 Pompeu, M. 174 Pordiano, E. 110 Por pli vasta komunumo 35 Portugalio 221 Povorin, M. 258 Premioj: Deguci 205 OSIÉK-premio 205 Ossaiki 2001 68 Piriol 205 Subvencio Cigno 205 Prilep 18 Princz, O. 81, 255

Puchová, E. 82 Puhl, F. 62 Puil, J. Le 108 Pumpri, T. 15, 202, 225

R Raats, E. 109 Radio 21, 109, 112, 138, 152, 165, 210 Ramos, C. 65 Rašič, N. 36, 44, Rau, H. 112 Raymundo, J. 17 Rebateto 21 Recenzio 66, 86, 116, 140, 159, 207, 230 Religio 234 Reto radio 21 Revuoj: Aktivameriko 131 Alvolko 107, 132 Argentina E-vento 100 Arĝenta Filiko 221 Armenio 100 Aujourd'hui l'espéranto 125 Avanco 165 Bosnia Lilo 101 Brazilia Esperantisto 100 Brita Esperantisto 101 Bulgara Esperantisto 164 Calete crítica 162 Contextos 220 El Pupilo Cinto 254 Esperanto 7, 36, 90, 129, Esperanto aktueli 164 Esperanto en Azio 132 esperanto 220, L' Esperanto Update 125 Esperantoteksto 160 Esperbilaj 101 E-ventoj 81, 149, 254 EU-Reporter 247 FEN-X 124 Fokuso 127 Gazetaraj Komuniki 129 Gidsate pri Esperanto 129 Homo kaj kosmo 127 Informilo por Interlingvistoj 134 Intergazeto 162 Internacia Pedagogia Revuo 133 Israela E-isto 101 Juna Amiko 112, 133 Juventud Rebelde 163 Katkazo 125 Klasse voor Leerkrachten 105 Komencanto 162, 219 Kontakto 106, 127, 129, 150 Language Problems and ... 181 Lanterno Azia, La 125 Latvia Esperantisto 165 LEA-informilo 165 Litova Stelo 165 Los Angeles Times Lumo 125 Mezmarata Stelo 165 Monlaro 127, 149 Monde l'Esperanto, Le 124 Mongolio 220 Neut Luzerner Zeitung 210 New Straits Times 105 Ni ĉiuj 220 Nia bulteno 221 Norvega Esperantisto 221 Nova Ilanida E-isto 101 Nuntempe 164 Okazas 124 Ondo de Esperanto, La 149, 162, 235, 255 OVO 107, 132 PC-Master 138 Pola Esperantisto 221 Republican Lorraine, Le 108 Starto 101 Sunday Mail 105 Tempo 164 The Economist Int. Unit 104 The Financial Times 104 Wydarzenia 246 The Independent 106 The Jakarta Post Tr'Affix 132 Update 101 Večernji list 130 Verda Sago 124 Wydarzenia 246 Ribčić, S. 19, 101 Ricci, G.+S., 39 Ritamäki, A. 133, 147, 160, Rivière, C. 181, 249 Rodríguez, D. 91 Rogora, T. 38 Tindemane, E. 181 Rondo Familia 182 Rossetti, C. 160 Rossi, M. 18

Ross, N. 14 Rotario 213 Rotsaert, R. 112 Roux, J. 108 Rumanio 109 Rusio 7, 173, 236 Rusilo, L.C. 110 Rusio 4, 15, 16, 17, 18, 19, 38, 39, 40, 67, 79, 82, 84, 92, 112, 133, 237 Rašič, N. 36, 44, Rau, H. 112 Raymundo, J. 17 Rebateto 21 Recenzio 66, 86, 116, 140, 159, 207, 230 Religio 234 Reto radio 21 Revuoj: Aktivameriko 131 Alvolko 107, 132 Argentina E-vento 100 Arĝenta Filiko 221 Armenio 100 Aujourd'hui l'espéranto 125 Avanco 165 Bosnia Lilo 101 Brazilia Esperantisto 100 Brita Esperantisto 101 Bulgara Esperantisto 164 Calete crítica 162 Contextos 220 El Pupilo Cinto 254 Esperanto 7, 36, 90, 129, Esperanto aktueli 164 Esperanto en Azio 132 esperanto 220, L' Esperanto Update 125 Esperantoteksto 160 Esperbilaj 101 E-ventoj 81, 149, 254 EU-Reporter 247 FEN-X 124 Fokuso 127 Gazetaraj Komuniki 129 Gidsate pri Esperanto 129 Homo kaj kosmo 127 Informilo por Interlingvistoj 134 Intergazeto 162 Internacia Pedagogia Revuo 133 Israela E-isto 101 Juna Amiko 112, 133 Juventud Rebelde 163 Katkazo 125 Klasse voor Leerkrachten 105 Komencanto 162, 219 Kontakto 106, 127, 129, 150 Language Problems and ... 181 Lanterno Azia, La 125 Latvia Esperantisto 165 LEA-informilo 165 Litova Stelo 165 Los Angeles Times Lumo 125 Mezmarata Stelo 165 Monlaro 127, 149 Monde l'Esperanto, Le 124 Mongolio 220 Neut Luzerner Zeitung 210 New Straits Times 105 Ni ĉiuj 220 Nia bulteno 221 Norvega Esperantisto 221 Nova Ilanida E-isto 101 Nuntempe 164 Okazas 124 Ondo de Esperanto, La 149, 162, 235, 255 OVO 107, 132 PC-Master 138 Pola Esperantisto 221 Republican Lorraine, Le 108 Starto 101 Sunday Mail 105 Tempo 164 The Economist Int. Unit 104 The Financial Times 104 Wydarzenia 246 The Independent 106 The Jakarta Post Tr'Affix 132 Update 101 Večernji list 130 Verda Sago 124 Wydarzenia 246 Ribčić, S. 19, 101 Ricci, G.+S., 39 Ritamäki, A. 133, 147, 160, Rivière, C. 181, 249 Rodríguez, D. 91 Rogora, T. 38 Tindemane, E. 181 Rondo Familia 182 Rossetti, C. 160 Rossi, M. 18

Togolando 18, 19, 64, 67, 107, 132, 162 Toledo, J. 165 Tomasz, J. 10 Tomson, P.J. 116 Tong, L.Y. 17 Tonkin H. 27, 37, 40, 84, 107, 129, 134, 151, 172, 174, 178, 200, 212 Torabi, R. 19, 78, Torres, L. 183 Toubaire, F. 113 Tra la mondo 12, 38, 62, 81, 157, 212, 236 Truduko 21 Sallies, L. 17 Sandoval, M. 131 Santor, R. 13 Sargjevo 18 Sartor, R. 91 Sartorio, A. 18, 40, 67, Schad, W. 115 Schadee, B. 80, 92, Schilt, G. 158 Schmitt, B. 20, 68 Scheller, M. 43 Schwabmer, T. 37, 224 Schubert, K. 231 Schudmak, A. 86 Schwartz, R. 65, 84, 108, 250 Scieno 106, 126, 134, 210, 234 Seabra, M. de 140 Sekelj, T. 133 Selim, Z. 81 Selten, R. 65, 93, 213 Sikosek, Z.M. 116, 210, 231, 245 Silfer, G. 38, Simola, A.L. 90 Singapuro 210 Sklotjo 138 Skotlando 18 Stakunabb-Kangas, T. 123 Slovako 11, 212, 258 Slovenio 258 Slowacki, J. 86 Smith, Ch. 68, 185 Smyčka, M. 15, 82, Soares, A. 18 Soares, C.D. 62 Sochnacki, A. 17, 38, 114, 236 Sokolova, E. 16 Soros, T. 84, 205 Spekuljak, M. 158 Spielhofer, D. 181 Spitzer, C. 181 Voigt, R. 66 Vortaroj 112 Vrbić, C. 256 Vávceva, T. 14 Vyčegjain, V. 237

La 88-a survoj... kaj ĝia glumarko (5,5x4 cm) pretas akompani viajn leterojn dum la sekvantaj monatoj. 12-peca folio kostas €1,20. Triona rabato ekde tri folioj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. 88-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Göteborg


Jen la plej vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj diversa kaj amuzo interesa por ĉiuj. Estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 2003 aperos 6-folioj. Abonu rezite de UEA aŭ ĉe via kotizperanto. KOTIZAKTO

ĈU VI JAM REKOTIZIS POR 2003? POR CERTIĜI, KE ANKAŬ EN 2003 VI AKURATE RICEVOS LA REVUON ESPERANTO, NE FORGESU PAGI FRUE VIAN KOTIZON. KOTIZTABELO APERIS EN LA OKTOBRA NUMERO, P. 199 (AŬ PETU DE LA CO), DANKON!

En 2002 154 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al Societo Zamenhof. Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj specialan donacon, kiu en 2002 estis letermalfirmilo. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

KLEKS en sia nigra serio prezentas... ULICA ZAMENHOFA de Roman Dobrzyński. Interparoloj kun la nepo de la kreinto de la lingvo Esperanto. En la pola. Bielsko-Biala: KLEKS, 2001. 286p, 20cm. € 7,50. Triona rabato ekde tri ekz., ĉe la Libroservo de UEA.

Language Problems & Language Planning. Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems. La problemoj. La solvoj. La rolo de planado en la homa komunikado. Kaj la kontribuo de Esperanto. Redaktas: Humphrey Tonkin, Frank Nuessel, Mark Fettes. Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519, Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam. Aperas trifoje jare. Individua abono: 58,00 eŭroj Institutia abono: 146,00 eŭroj Abonu pere de la Libroservo de UEA.



Eseoj memore al  
**Ivo Lapenna**  
Redaktoro: Carlo Minnaja

### ESEOJ MEMORE AL IVO LAPENNA

Fascina mozaiko de personaj rememoroj pri la arkitekto kaj konstruisto de la moderna UEA. Kopenhago, 2001. 417p. 25cm. Kun kompaktdisko. Prezo: €45,00. Triona rabato ekde 3 ekz.



### RETORIKO MALPLIKOSTA

Retoriko. Science reduktita, pense riĝiga verko de Ivo Lapenna. Roterdamo, 1971 (trita eldono). 294p. 20cm. Prezo: €19,80 (malnova prezo: €23,15). Triona rabato ekde 3 ekz.



### REMEMOROJ

de  
**TEODORO SCHWARTZ / TVADAR SOROS**

...la unua mondmilito

MODERNAJ ROBINZONOJ

En la siberia prarabaro

Enkonduko de H. Tronka.

Berkelejo: Bero, 1999

(dua eldono). 9+47p.

22cm. Prezo: €6,00.

Sesona rabato ekde 3 ekz.

...la dua mondmilito

MASKERADO ĈIRKAŬ LA MORTO

Nazismendo en Hungario

Redukto kaj komentario de H. Tronka.

Rotterdam: UEA, 2001

(dua eldono). 318p.

21cm. Prezo: €24,00.

Triona rabato ekde 3 ekz.



## La tri volumoj KULTURO KAJ...



Unflar vastaj partotemoj al la dilemoj de la nuntempa mondo. Aperigante trijn ĉi referencojn en Esperanto UEA demonstris sian ligitecon al la streboj de Unesko pri kultura kaj prezentiĝis al E-parolantoj legulojn kiuj helpas meti la strebojn kaj celaron de la E-movado en pli vastan kuntekston. (Vilmos Benzcik, Esperanto 1999:12)

**KULTURO KAJ EVOLUO.** Mervyn Claxton. Trad. Johano Rapley. 1998. 60p. ISBN 92 9017 59 X. 21cm. €6,90.

**KULTURO KAJ TEKNOLOGIO.** Andrew O. Urechu. Trad. Johano Rapley. 1997. 63p. ISBN 92 9017 053 0. 21cm. €6,90.

**KULTURO KAJ SANO.** Mervyn Claxton. Trad. Helga Rapley. 1999. 42p. ISBN 92 9017 060 3. 21cm. €5,40.

Triona rabato por samtempa aĉeto de ĉiuj tri librotoj aŭ de 3 ekz. de sama libroto. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.